

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Kion post
Kampanjo 2000?



Estara Raporto
1999



Fighiera pri
komunumo
kaj movado



Lingvoj: Bunteco gardenda

Vi trovos...

101 Malferme

Ni re-iĝu movado:
Invito al diskuto

Renato Corsetti

102 LA GRAVITO-SISTEMO DE LINGVOJ

Jean-Louis Calvet

Dek lingvoj
mortas ĉiujare



Corsetti

104 Estrano

Kio post inspira Kampanjo 2000?

105 Eksteraj rilatoj

Por levi prilingvan konscion

106 PLUVU AŬ SUNU: MALFERMA TAGO

107 Estrana Raporto 1999

UEA en 1999

Ĝeneralaĵoj: Komitato ĉiam pli virtuala

108 Administrado: La unua eŭro-jaro

Kongreso: Multnombro en metropolo

109 Financo: Ekvilibro post longa marŝo

Kampanjo 2000: Ambicia novaĵo
apud tradicioj

110 Landa kaj

regiona agado: Reta diskuto, pacifika
debuto

Informado: Pli kaj pli komunikade

111 Edukado: Interkulture

112 Eksteraj rilatoj: Partnerece kun Unesko

Kulturo: Jaro de jubileoj

Ĝunularo: Pozitiva jaro, stabiliĝo

Faka agado, scienco: Teksi retojn
per la reto

113 Lingvo, esploro

kaj dokumentado: Ponto fortigita

114 Financaj aldonaĵoj: Spezokonto. Bilanco

Kaj plue...

116 Fake

117 Lingve - Influe - Loke

118 Persone - Foliume

119 Laste aperis

120 Forpasoj

La kovrilo: Bunta papageto (Pictor-Uniphoto)

Dekstra paĝo: Etaj vilaĝoj en centra Karamoja, Ugando (Unesko/J. H. Blower)

ESPERANTO


Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32; USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.



NI RE-IĜU MOVADO: INVITO AL DISKUTO

La Kampanjo 2000, kiun pluraj entuziasme partoprenis, estas finiĝanta. Ĉu ĝiaj celoj estis atingitaj? Jes kaj ne!

Jes, oni decide antaŭeniris en la kampo de rilatoj kun internaciaj instancoj kaj en la kampo pri levado de la prestiĝo de Esperanto en difinitaj medioj.

Tamen, tio kio ne tute funkciis estis la celo "levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperanto-movado". La movado estas ĉi-rilate en transira periodo, de eŭropeco al ne-eŭropeco, de nordeco al sudeco. Trovi la manieron enplekti en la vivon de Esperantujo la e-istojn kies viv- kaj kotiz-niveleoj estas malsamaj ol la niaj en pagopovaj landoj, estas la defio kiu atendas nin ĉiujn.

En ĉi tiu situacio la Komitato de UEA komisiis kelkajn siajn membrojn ellabori novan agad-programon, por gvidi la laboron en la unuaj jaroj de la nova jarmilo.

La projekto de plano nun estas elmetata al kiom eble plej vasta diskutado, fare de la Komitato kaj de la tuta esperantistaro. La nova plano funkcios nur se la tuta komunumo volos ĝin kaj rekonos siajn ideojn en ĝi. Ne hezitu skribi rete al <labor-plano@esperanto.se> aŭ krawone al la kutima adreso de UEA.

En ĉi tiu artikoleto ne estas spaco por prezenti la planon. Pri tio vi devas atendi artikolojn en la postaj numeroj de ĉi tiu revuo aŭ de via landa revuo.

Sed jam nun sciu ke la plano baziĝas sur interplektado de *tri agad-tavoloj*: komprenigi Esperanton (ekstera informado, interna klerigado), paroligi Esperanton (de bazaj kursoj ĝis renkontiĝoj kaj kongresoj), kaj utiligi Esperanton (por interkultura edukado kaj internacia praktika kunlaboro), kaj *tri agad-kolonoj*, aplikeblaj al ĉiu tavolo: profesiigo, plijuniĝo kaj tutmondiĝo.

Juĝi ĉu organizaĵo aplikas tion, estas facile. Sufiĉas rigardi al kiuj celoj la homaj kaj monaj fortoj estas dediĉitaj.

La senco de la tuto, tamen, estas facile resumebla: ni bezonas re-iĝi movado parolanta al la homaro, kaj mondskala movado. Tiu movado mezuru siajn atingojn per la kvanto de konvinkitaj neesperantistoj kaj ne cedu al la tento fariĝi institucio kiu, estraran raporton post estrara raporto, provas konvinki sin mem pri siaj atingoj.

Ni bezonas retrovi la radikojn de nia esperantisteco kaj produkti valorojn proponebajn kaj proponatajn al la neesperantista mondo. Ni ekzistas por servi ĝin kaj ne nin.

Ni bezonas reakiri la fieron esti esperantistoj, ĉar nun kiel antaŭ unu jarcento, aŭ eble eĉ pli ol tiam, agas fortoj kiuj sisteme provas senigi homgrupojn je la Homaj Lingvaj Rajtoj, kiujn ni defendas.

Renato Corsetti




La gravito-sistemo de lingvoj

Jean-Louis Calvet

Dum nia tutmonda lingvo vivas tro serenan vivon sen multe da kresko aŭ malkresko, la mondo ĉirkaŭ ni konstante ŝanĝiĝas – ankaŭ lingve.

Same kiel ekologio prezentas la vivularon kiel serion de inter-artikitaj eroj ekde unuopa ĉelo ĝis la kompleta ekosistemo, tiel same oni povas prezenti la mondan lingvaron kiel sistemon de gravito. Nuntempe la ŝlosilan pozicion okupas la angla, “hiper-centra” lingvo ĉirkaŭ kiu gravitas deko da “super-centraj” lingvoj. Ĉirkaŭ 100 aŭ 200 “centraj” lingvoj, ligitaj al la “super-centraj” per du-lingvaj parolantoj, rivoluas 4 aŭ 5 mil lingvoj “periferiaj”.

Ĉiu el tiuj lingvoj havas malsaman pezon, malsamajn viglon kaj perspektivojn. Dum ilia granda plejparto alfrontas duban estontecon, pli kaj pli da streboj celas al ilia konservado. Lingvojn oni nun konsideras, same kiel fokidojn aŭ balenojn, specioj en danĝero. (...)



La insulo Nov-Gvineo, granda kiel Francio, estas hejmo de sepcento da lingvoj.

Dek lingvoj mortas ĉiujare

La monda lingvaro havas tre malegalan distribuon. Laŭ takso de la Lingvistika Instituto Summer (SIL), kiu aktivis por la protektado de la malplej konataj lingvoj, nur 3% de la lingvoj de la mondo estas uzataj en Eŭropo, dum duono de ili hejmas en la regiono de Azio kaj Pacifiko, kie plej elstaras Nov-Gvineo, kun ne malpli ol unu sesono de la monda lingvaro.

Lingva diverseco kaj denseco de loĝantaro ne estas proporciaj: 96% de la lingvoj estas parolataj de nuraj 4% de la mondloĝantaro, kaj pli ol 80% estas limigitaj al unu lando. Nur ĉ. 20 lingvojn parolas po centmilonoj da homoj en pluraj landoj.

Kvankam la ciferoj malsamas laŭ la metodo de nombrado, *Millenium Family Encyclopædia* taksas ke ĉ. duono de la mondanoj uzas ĉiutage unu el la ok tutmonde plej disvastiĝintaj lingvoj, kiuj estas: la

ĉina (1,2 miliardoj da parolantoj), la angla (478 milionoj), la hinda (437 milionoj), la hispana (392 milionoj), la rusa (284 milionoj), la araba (225 milionoj), la portugala (184 milionoj) kaj la franca (125 milionoj).

Pro tiu malekvilibro la fakuloj antaŭvidas ke 95% de ĉiuj nunaj lingvoj malaperos en la sekva jarcento. Nuntempe, ĉiujare dek lingvoj mortas ie en la mondo. Laŭ iuj, lingvomorto okazas eĉ ĉiun duan semajnon. Aparte multaj lingvoj pereas en regionoj de tre granda lingva diverseco.

En Afriko pli ol 200 lingvoj, kun malpli ol po 500 parolantoj, estas formortontaj. Oni ja taksas ke por la pluvivo de ajna lingvo necesas minimume 100 000 parolantoj.

En Norda Ameriko la plej fortan minacon spertas la indiĝenaj kaj kreolaj lingvoj. En Usono kaj Kanado ĉiuj 200 indianaj lingvoj ĝis nun travivintaj troviĝas en danĝero escepte de la navahoa, krija kaj aniŝnaba (oĝibŭa).

El la kvincento da indianaj lingvoj de Latinameriko, inter triono kaj duono estas endanĝerigitaj. La plej grandan malkreskon oni antaŭvidas



"Lingva milito": Nur metaforo

Lingva politiko povas prosperi nur se ĝi laŭas la evolu-vojon de la koncerna socio, kaj malofte oni sukcesas trudi lingvon aŭ lingvan reformon al homoj malvolaj. Ĉu do eblas protekti (aŭ savi) lingvon kies parolantoj ĝin ne plu deziras? Ne la lingvo en si mem gravas, sed la valoro kiun ĝi havas por siaj parolantoj.

Lingvo malaperas ne nur ĉar alia lingvo ĝin superas, sed ankaŭ — kaj eble precipe — tial ke homoj akceptas aŭ elektas forlasi ĝin kaj ne transdoni ĝin al siaj infanoj. "Lingva milito" taŭgas kiel metaforo, sed ne la lingvoj mem kontraŭmilitas unu la alian. Batalas, luktas, paciĝas — homoj. Iliajn konfliktaĵojn rilatojn ni povas ekzameni en la spegulo de iliaj lingvaj rilatoj.

Lingvistoj ĉiam bedaŭras la morton de ajna lingvo, sed lingvoj ne estas muzeaĵoj. Ili apartenas al siaj parolantoj, kiuj ilin konstante ŝanĝas kaj adaptas al siaj bezonoj. Ili devas servi la homojn, kaj ne inverse. La lingvoj ja evoluas senĉese, en siaj formoj kaj en siaj rilatoj. Unuj mortas, aliaj naskiĝas, ofte antaŭ niaj okuloj.

Post la falo de la Berlina Muro kaj la diskolapso de Jugoslavio, aperis novaj landoj kun siaj firmiĝantaj lingvoj: la bosna, la serba, la kroata, antaŭe kon-

sideritaj kiel unusola serbokroata lingvo. Por emfazi sian identecon, la parolantoj nun elstarigas la diferencojn, kiuj koncernis nur kelkdekon da vortoj. Simile, la disiĝo de Ĉeĥio kaj Slovakio pli malproksimigas la lingvojn ĉeĥan kaj slovakon.


En la francparolaj partoj de Afriko aperas lokaj formoj de la oficiala franca lingvo. Iom malsamajn variantojn oni uzas en Senegalio, Gabono, Niĝerlando kaj Ebura Bordo.

Ĉi tiuj diferencoj, kvankam ĝis nun moderaĵ, eble heroldas disfalon de la franca, kiu povus fariĝi iaspeca patrina lingvo por nova lingvogeneracio, same kiel la latina patrinis la latinidajn lingvojn. Tiel okazas ankaŭ pri la angla, araba kaj hispana. Oni parolas ne tute saman lingvon en Madrido kaj en Bonaero, en Londono kaj Bombajo, en Rabato kaj Rijado.

La funkcio de lingvoj ja influas ilian formon. La lingvoj uzataj en la ĉefurbaj bazaroj de Afriko iom post iom malsimiliĝas de sia origina formo. La volofa en Dakaro ne estas la volofa de kamparanoj, kaj en Bamako aŭdiĝas ne la sama bambara kiel je 230-kilometra distanco, en Ségou.

En la 17-a kaj 18-a jarcentoj, en diversaj situacioj, kreolaj lingvoj evoluis kiel lingva solvo por la komunika problemo de malsamlingvaj sklavoj transportitaj al la insuloj de Hindia Oceano kaj Karibio. Surbaze de eŭropaj lingvoj kiel la angla, franca aŭ portugala, ili kreis lingvojn hodiaŭ malsamajn. Homoj el Maŭricio, Haitio kaj Gvajano ne povas interkompreniĝi, kvankam iliaj lingvoj devenas de komuna praulo, la franca. Eble la posteuloj de enmigrintoj iam parolos, krom la lingvo de sia loĝlando, iun germanian turkan aŭ francian araban, malsaman de la origina formo.

GEOGRAFIA DISTRIBUO DE LA LINGVOJ DE LA MONDO



Lingvistik Instituto Summer

en Brazilo, kie la plej multaj lingvoj estas parolataj en tre etaj komunumoj.

Ĉiu el la lingvoj de Sud-Orienta Azio havas relative grandnombran parolantaron, tiel ke la estontecon de 40 el ĝiaj ĉ. 600 aŭ 700 lingvoj difinas precipe la lingvopolitiko de ŝtatoj.

Aliflanke, nur 6 el la 47 lingvoj de Nord-Orienta Azio havas veran ŝancon travivi fronte al la rusa. 20 estas "preskaŭ elmortintaj", 8 en "serioza danĝero" kaj 13 "en danĝero". La unuajn parolas ne pli ol po deko. La duaj uziĝas pli vaste, sed ne plu heredigas al infanoj. La triaj havas ankaŭ infanajn parolantojn, sed ĉiam malpli, laŭ "Ruĝa libro pri lingvoj en danĝero: Eŭropo kaj Nord-Orienta Azio", aperonta ĉe Unesko.

Laŭ la sama verko, en Eŭropo — kie la plej alta takso duoble superas la plej malaltan, depende de la kriterioj uzataj — 123 lingvoj estas parolataj, el kiuj 9 estas preskaŭ elmortintaj, 26 en serioza danĝero kaj 38 en danĝero.

La angla rapide diversiĝas

Por la angla lingvo validas la samo. Ĝia superregado estas nuntempe senduba kaj certan tempon daŭranta. Sed la historio montras ke ju pli iu lingvo disvastiĝas geografie, des pli ĝi emas diversiĝi, tiel ke la angla povus sperti la sorton de la latina.

En tiu aspekto, la lingva mapo de la mondo nepre ŝanĝiĝos en la venontaj jarcentoj. Multaj lingvoj nun parolataj de manpleno da homoj estas formortontaj, dum novaj lingvoj aperas kaj aperos. Alivorte, en la komence skizita gravita modelo lingvoj kaj iliaj funkcioj evoluos: la hiper-centraj kaj super-centraj lingvoj eble ŝanĝiĝos, dum iuj periferiaj iĝos centraj kaj inverse. Kiel historio mem, lingvohistorio ne finiĝas per la nuno, ĝi daŭras kaj ĉiun minute evoluas sub la efiko de la lingvo-uzantoj.

Ambaŭ artikolojn (UNESCO Sources, apr. 2000) tradukis, el la angla kaj franca, István Ertl

Ĉiutage ja estras la Estraro: foje dekoj da retmesaĝoj flugas en unu tago inter ĝiaj membroj en tri horzonoj kaj kvar kontinentoj. Ne hazarde, do, ke jam inter la unuaj tagordaj punktoj ĝi starigis precizajn regulojn por siaj retaj voĉdonoj. Ĉe tio per junularaj spertoj konsilis ĝin TEJO-prezidanto Sjoerd Bosga, de kiu oni ankaŭ eksciis ke la Honkonga IJK forte bezonas pliajn aliĝojn. Krom Bosga ĉeestis la kunsidojn alia observanto, Stefan MacGill, por ILEI, kaj okaze tiuj oficistoj de la CO kies laborkampon la diskuttemoj tuŝis.

Antaŭ la diverstemaj diskutoj, kiuj neeviteble traktis ankaŭ multajn detalojn, Renato Corsetti provizis larĝan perspektivon, memorigante pri konstato de la Komitato en la Berlina UK, laŭ kiu necesas komenci vastan diskuton pri la strategio kiu sekvu post Kampanjo 2000. Bazon por tia diskuto donos tekstoj aperontaj ĉi-revue.

Retrovi la kreskon

Zorgigas la daŭra, kvankam ne drasta, malkresko de la membraro. Unu el la manieroj kontraŭbatali tiun tendencon estas instigi al pli granda efikeco la kotiz-perantojn, jamajn kaj novajn — formulis Corsetti. Aliflanke, allogu membrojn servoj altkvalitaj. Ĉi-rilate lastatempaj evoluoj estas, ekzemple, ke UEA informas per praktika kaj eleganta TTT-paĝo (vidu apr., p. 76), ke ĝi dissendas al petantoj Gazetarajn Komunikojn tradukatajn al tri lingvoj, aŭ ke por la UK en Zagrebo (2001) la Estraro decidis pri aparte favora aliĝ-kotizo por ŝtatanoj de eks-jugoslavaj landoj (krom Slovenio). Iuj

Kio post inspira Kampanjo 2000?

István Ertl

En la lastaj tri tagoj de aprilo kunsidis ĉiuj sep membroj de la Estraro de UEA en Roterdamo.



Ivo Lapenna iniciatis en 1949 oratorajn konkursojn: ili restariĝos en 2001.

aliaj plibonigoj, kiel ekz. pli ofta sendado de konteltiroj, eblus post la pli kaj pli necesa modernigo de la komputila sistemo en la CO, kiu aĝas jam 8 jarojn.

La Estraro ricevis proponon pri nova elekto-regularo de la komisiono tiucele fondita (Brian Moon kaj SYŌZI Keiko), kiun ĝi pludonas al la Komitato. Proponon pri la elekto de komitatanoj B submetis la rusa aktivulo Viktor Aroloviĉ: estus elektitaj nur la kandidatoj kiuj ricevis almenaŭ duonon de la donitaj voĉoj. Tiu propono estis malakceptita kun la rimarkigo (Buller) ke la nuna sistemo kongruas kun tiu de la nuntempaj demokratioj.

Ĉe Unesko kaj en Eŭropo

En siaj eksteraj rilatoj, UEA fidelas al siaj humanismaj kaj klerigaj tradicioj aktive rilatante kun Unesko, kies Manifeston 2000 ĝi rekomendas por ĉies subskribo. Geografie aparte gravas ĝia agado en Eŭropo, kie la ŝancojn, laŭ multaj movadanoj, oni devas kapti

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

EVENTOJ La plej ofta E-gazeto!
pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario

ĝuste nun. Tial oni decidis baldaŭ inviti al kunordiga kunsido diversajn aktivulojn de la eŭropa agado.

Eta ŝanĝo estis farita en la estrara taskodivido: “landa agado”, ĝis nun parte ĉe Corsetti, kuŝas nun tute sur la ŝultroj de Huĝimoto, dum Gbeglo proponis sin por la agadkampo sporta. Kiel novaj UEA-reprezentantoj ĉe UN en Novjorko, apud Rochelle Grossman, Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes, estis nomumitaj Ulrich Becker kaj Daniel Cuthbert. La komisiono de Rondo Familia (esperantistaj familioj) nun konsistas el Amri Wandel, Renato Corsetti, Jouko Lindstedt, Stefan MacGill kaj Katarína Bodnárová. Estis konstatita malaktiviĝo de Monda Kunagado, Unesko-asocio por esperantistoj, pro kio ĉesas ĝia statuso kiel faka asocio aliĝinta al UEA.

En la kultura kampo, la Estraro parolis i.a. pri revivigo de oratora konkurso por gejunuloj, iam starigita de Ivo Lapenna kiel programero de Universalaj Kongresoj. Oni intencas de nove organizi ĝin en la Zagreba UK, eventuale kun forigo de la aĝlimo.

Huĝimoto lanĉis la ideon de nova, ampleksa UEA-revuo kun kultura enhavo kaj pagitaj redaktoroj, sed forte dubeblas ĉu ekzistas merkato por tia periodaĵo. Du mondliteraturaj verkoj estis akceptitaj por la serio Oriento-Okcidento de UEA: *La lada tambureto* de Günter Grass (trad. T. Chmielik) kaj *La malvivaj animoj* de Gogolj (trad. V. Vyčegjanin).

Donaco prudente uzota

Se nia revuo estus bulvarda ĵurnalo, sur ĉi tiu paĝo certe starus grandlitera titolo “Sumego el Japanio” aŭ simile. Nome, mallonge antaŭ la estrar-kunsido, dumviva membro de UEA el Japanio, s-ro GOTÔ Mituo, inspirita de Kampanjo 2000, donacis al UEA ĉ. 900 000 eŭrojn. Komisiono (Enderby, Corsetti, Buller) formulis rekomendojn al la Estraro pri tio kiel plej prudente direkti la novajn rimedojn kiujn ebligas la grandanima donacego.

Je pli ordinara nivelo, pri la financoj de UEA notindas ke la pasinta jaro rezultigis praktike nulsaldan spezokonton: granda progreso kompare al 88-milguldena deficito en 1991. La baza membrokoto ne altiĝos en 2001. ★



Shimon Peres: Alta Protektanto de la 85-a UK

Shimon Peres, Nobel-pacpremiito en 1994, akceptis la inviton de UEA esti Alta Protektanto de la 85-a UK en Tel-Avivo. Nia kongreso, rekonita de Unesko kiel Flagsipa Evento de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco, apenaŭ povus havi Altan Protektanton pli ligitan al la celoj de tiu Jaro kaj de ĉiu UK ol Peres, konata kiel unu el la arkitektoj de la regiona pacprocezo. Mem modelo de sentima agado por anstataŭigi kulturon de perforto per tiu de paco, Peres estis kuniniciatinto de Manifesto 2000 por la Kulturo de Paco kaj Senperforto. Aktiva politikisto jam duonan jarcenton, vicprezidanto de Socialista Internacio, li multfoje postenis kiel ministro, dufoje kiel ĉefministro. En la nuna registaro li estas ministro pri regiona kunlaboro.

Eksteraj rilatoj



Por levi prilingvan konscion

UEA celtrafe laboris por levi la konscion pri lingvaj rajtoj kaj lingvaj problemoj en la Jarmila Forumo de Neregistara Organizaĵoj (NRO-j).

De 22 ĝis 26 majo ĉ. 1300 homoj el 700 NRO-j partoprenis en la Jarmila Forumo ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. UEA estis reprezentita de prof. LEE Chong-Yeong, d-ro Mark Fettes kaj la konstanta UN-reprezentanto de UEA, Rochelle Grossman.

La Forumon iniciatis la NRO-j mem, responde al la planoj de UN okazigi grandan pintkunsidon de ŝtatestroj (“Jarmila Pintkunsido”) en septembro 2000. La organizantoj esperis per tiu maniero iom influi la interregistarajn diskutojn pri la estonteco de UN.

Kontraste al la oficialaj konferencoj, la Jarmila Forumo disponis pri tre malmultaj rimedoj — malpli ol duonmiliono da dolaroj — kaj neeviteble suferis reprezente kaj organizate. Forestis multaj konataj NRO-j, kaj grandaj partoj de la mondo ĉeestis nur per manpleno da homoj. Ankaŭ la diskutoj spegulis mankon de bona preparo, tiel ke nur tre malfacile el-laboriĝis en la lastaj horoj komuna konkludaro de la delegitoj.

Malgraŭ tiuj malfortoj, la UEA-grupo celtrafe laboris por levi la konscion pri lingvaj rajtoj kaj lingvaj problemoj. Disdoniĝis multaj centoj da informiloj,

i.a. kajero kun la Manifesto de Prago en la ses oficialaj lingvoj de UN, kaj plurfoje en la pleno la delegitoj de UEA prenis la mikrofonon por atentigi pri lingva dimensio de la diskutoj. Fine, en la rekomendojn de du temgrupoj, pri “Homaj rajtoj” kaj “Tutmondiĝo”, ili sukcesis enmeti frazojn pri lingvaj rajtoj, la konservado de lingva diverseco kaj la bezono de egaleca interkultura komunikado.

En la lasta tago UEA aranĝis apartan kunsidon pri “Lingvo kaj homaj rajtoj”, nome de la Koalicio de NRO-j por Internacia Helplingvo (vidu jun. '97, p. 101). Kvankam ĉeestis nur reprezentantoj de Transnacia Radikala Partio, Mondfederista Movado kaj Ŝintoismo, la kunsido montriĝis tre utila por disvolvi komunan strategion en la rondoj de UN. Tre klare sentiĝas bezono de NRO-grupo kiu konstante konsciigu pri la rolo de lingva diverseco en socia evoluo kaj monda demokratio, kaj kiu varbu aliancantojn inter la ŝtatoj same kiel ĉe la diversaj branĉoj de UN. Nur surbaze de tiu pli vasta konscio, la kontribuo de Esperanto povos ricevi pli vastan agnoskon kaj subtenon. En la venontaj monatoj konkretiĝos agadplano surbaze de tiu ideo. ★

PLUVU AŬ SUNU: MALFERMA TAGO

La 12-a eldono de la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 13-an de majo, pruvigis ke temas pri veter-imuna aranĝo.



Gian Carlo Fighiera (dekstre) kun Osmo Buller



Junula rondo kafo-table

Prelegas Fighiera. Malfermaj Tagoj iĝas strategia diskutforumo.



Ciuj fotoj: UEA/F. Vauthier

Malgraŭ somermezeca belega vetero la Malferma Tago kolektis saman nombron da vizitantoj (85) kiel unu jaron pli frue en malpli bela tago. Krom el pluraj eŭropaj landoj, po du vizitantoj venis eĉ el Brazilo kaj Japanio.

La ĉefgasto de la tago estis Gian Carlo Fighiera, iama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA kaj multflanka movada aktivulo. Li prelegis trifoje pri la obstakloj kaj ŝancoj kiujn li vidas por Esperanto en la tria jarmilo. Laŭ peto de UEA Fighiera prilaboros sian prelegon, konsiderante ankaŭ la ideojn el la viglaj postprelegaj diskutoj, por aperigo en la serio de Diskutkajeroj de UEA.

Krom aŭskulti al Fighiera, spektistoj filmojn kaj babili ĉe la kaftablo, la gastoj ankaŭ multe butikumis

en la libroservo, kiu vendis dum la tago por € 2185,40. Ĉefe furoris novaj libroj de UEA, kiel *Paĉjo, kio estas rasismo?* (10 ekz.), *Esperantaj sinonimoj* (8), *Kio estas demokratio?* (6) kaj *Hejma vortaro* (5). Inter la verkoj de aliaj eldonistoj elstaris la romano *La ŝtona urbo* de Anna Löwenstein (7).

Jam nun la Centra Oficejo invitas por sia sekva Malferma Tago, kiu okazos la 25-an de novembro.

Fighiera: Komunume kaj movade

En sia prelego, Gian Carlo Fighiera unue skizis la historian naskiĝon de la E-societoj, ekde la tempo de Zamenhof. En la kadro de tiu organiza procezo, la fruaj diasporaj esperantistoj spontane unuiĝis en lokaj, landaj kaj internaciaj asocioj.

Jam en la intermilita periodo — daŭrigis Fighiera — leviĝis la demando ĉu tutmonda esperantista asocio estu komunumo de individuaj membroj, kiuj uzas E-on inter si, aŭ ĉu ĝi agadu kiel movado por la ekstera disvastigo de la internacia lingvo.

Post la milito, la du konceptoj kompromise kunfandiĝis en UEA, kiu nun samtempe konsistas el individuaj membroj kaj el landaj asocioj. Danke al tiu sistemo, UEA:

1. provizas per servoj ĉiujn esperantistojn, ankaŭ nemembrojn (la UK, libroservo, revuo ktp); kaj
2. strebas por la progresigo de Esperanto.

Laŭ Fighiera, se al tio ni aldonas la agadon de TEJO (junulara sekcio de UEA), la subtenon de UEA al la Akademio, kaj la fakton ke preskaŭ ĉiuj fakaj asocioj formale kunlaboras kun (aŭ estas aliĝintaj al) UEA, ni facile alvenas al la konkludo ke UEA formas sistemon samtempe *horizontalan per-Esperantan kaj vertikalan por-Esperantan*. Pro tio, al UEA — kiel komunumo kaj movado — referencas eble 90% de ĉiuj agantaj esperantistoj en la mondo. Eĉ la kelkaj asocioj kiuj volas resti ekster ĝia sistemo povas libere kunlabori en la kadro de sendependaj Strategiaj Forumoj kiujn UEA iniciatis.

Do, planado de nova fantazia asocio (eĉ se nomata "establo") kun propraj tribunalo kaj episkopo fariĝas ridinda kaj senutila sekteca splito de niaj limigitaj fortoj — opinias Fighiera. Same, sencela tempoperdo aspektas ĉia ideologia batalo inter esperantistoj, ĉar preskaŭ ĉiu aganto por la

internacia lingvo sentas sin samtempe "raŭmisto" kaj "finvenkisto".

La parolanto akcentis ankaŭ ke jam de duona jarcento la statuto de UEA indikas la aliĝon de la asocio al la homaj rajtoj, kaj ke la temo de ĉiu UK estas dediĉita al socia demando.

La priskribita situacio, diris Fighiera, donas al ĉiuj segmentoj de la esperantista vivo apartajn taktikan kaj strategiajn taskojn.

Taktike, la sekvantoj de la Zamenhofa lingvo ĝin plue utiligu kaj disvastigu ĝis la historiaj cirkonstancoj favoras la universaligon de la lingvo.

Strategie, estus utile adopti politikon de mallongaj paŝoj. Nur UEA disponas pri bazaj rimedoj por ellabori tian strategion, kies unuaj paŝoj povus esti konferenco de la eŭro-parlamentanoj kiuj subtenas E-on, sekvota de interregistara konferenco pri la lingvoproblemo.

La Esperanto-grupo
de la urbo Oaxaca,
Meksiko, en 1999.

UEA en 1999

Leonora González



ĜENERALAĴOJ

Komitato ĉiam pli virtuala

Strukturo kaj konsisto

Du novaj landaj asocioj, Kartvelia kaj Kostarika Esperanto-Asocioj, estis akceptitaj de la Komitato en Berlino, tiel ke jarfine UEA havis 62 aliĝintajn landajn asociojn. La nombro de la fakaj asocioj restis senŝanĝa: 9 aliĝintaj kaj 39 kunlaborantaj.

La individuaj membroj (IM) estis entute 7075 en 119 landoj (1998: 7360 en 120 landoj) kaj konsistis el: 510 Membroj (M) kun Gvidlibro, 1528 M kun Jarlibro, 451 junaj M kun Jarlibro, 3404 M-Abonantoj, 220 junaj M-Abonantoj, 876 Dumvivaj Membroj (DM), 17 junaj DM, 57 Honoraj M kaj 12 M de Honora Patrona Komitato (vidu laŭlandan statistikon, apr.'00, p. 66). La ricevitaj IM-kotizoj aliaj ol DM sumiĝis je € 159 778, t.e. 3754 malpli ol en 1998. Entute la IM-kotizoj tamen kreskis per € 6033, pro pli alta kontribuo de DM.

La landaj asocioj (LA) anoncis 12 096 aligitajn membrojn (AM), (12 812 en 1998), el kiuj 1649 (1959) estis AM de TEJO. Ĉe pluraj LA la anoncitaj membroj tamen ne spegulas la efektivan membronombro, sed dependas de la financa forto de la asocioj en la koncerna jaro. Estas indikoj ke en 2000 la AM spertos denove kreskon post plurjara falo.

La Komitato nomumis 5 novajn Honorajn Membrojn (HM): Petras Čeliaskas (Litovio), Aldo de' Giorgi (Italio), Ĥristo Gorov (Bulgario), Baldur Ragnarsson (Islando) kaj YAMASAKI Seikō (Japanio). Baldaŭ post la nomumo, atingis la Komitato sciigo pri forpaso de s-ro Gorov. Aliaj forpasintaj HM estis Marie Bartovská, Barbara Cvetkova, Oene Hoekstra, Gustav Kühlmann, Catherine Schulze kaj Eduard Tvarožek.

La delegitaro de la Jarlibro 1999 konsistis el 1959 individuoj en 100 landoj (1998: 1981 en 94 landoj). Estis 47 ĉefdelegitoj, 1074 (lokaj) delegitoj, 140 vicdelegitoj, 61 junularaj kaj 1430 fakdelegitoj. Krome, en Brazilo funkciis 5 regionaj delegitoj. Unuafoje estis elektita ĉefdelegito por Irlando kaj Rumanio.

Gvidorganoj

La Komitato (Jarlibro 1999, p. 17-21) konsistis el 56 A-, 8 B- kaj 12 C-komitatanoj kaj 11 observantoj. En Berlino estis alelektitaj 2 komitatanoj C, tiel ke sume la Komitato havis 78 plenrajtajn membrojn. En la kunsidoj en Berlino partoprenis 65 membroj kaj 3 observantoj. Dum la jaro funkciis ankaŭ reta diskutlisto de la Komitato, en kiu jarfine partoprenis jam pli ol duono de la komitatanoj.

La Estraro ricevis en Berlino sepan membron per la alelekto de Tacuo Huĝimoto por la fakoj kulturo kaj landa agado. Listo de la estraranoj kun iliaj kontaktadreso aperas en ĉiu numero de *Esperanto*. La Estraro kunsidis fine de marto en la CO kaj dum la UK. Krome la estraranoj vicle diskutis rete tra la jaro. ♦



ADMINISTRADO

La unua eŭro-jaro

Personaro

En la stabo de la Centra Oficejo ek-laboris unu plia oficisto en la librotena kaj kongresa fakoj. Sekve estis entute 12 oficistoj el kiuj 2 partatempaj, ekvivalentaj al la laborforto de 11 plentempaj deĵorantoj. Tiamaniere la CO revenis al la situacio de antaŭ 1996, kiam foriris unu oficisto.

Du volontuloj helpis, dum periodoj de unu ĝis tri monatoj, ĉefe dum antaŭ-kongresaj preparoj kaj en la Libroservo. Aldone, tra la tuta jaro regule kontribuis 4 lokaj volontuloj en la biblioteko, librotenado kaj prizorgado de la domo. Afrika volontulo okupiĝis dum ses monatoj pri la afrika agado, kaj du junuloj deĵoris sinsekve por TEJO dum entute 26 semajnoj.

Ekipaĵoj, domo

La Grafika Fakoj ricevis novan arkivilon kaj koloran skanilon, kiu igis pli facila la traktadon de fotoj por la revuo *Esperanto*. Pli kaj pli sentebis la maltaŭgeco de la centra komputila sistemo, sep

jarojn aĝa, sekvi la teknikajn evoluojn de la lastaj jaroj, precipe pri (ret)komunikado.

Zorgigas la akuta manko de spaco por la Biblioteko Hodler, kaj ekestis planoj por movi ĝin al novaranĝita parto de la domo.

Servoj

La Jarlibro aperis komence de junio. La kreskanta nombro de donitaĵoj pri la delegitoj, ĉefe retadreso kaj hejmpaĝoj, pliampleksigis ĝin je 8 paĝoj kompare kun la antaŭa jaro, kvankam la nombro de delegitoj iom malkreskis.

La revuo *Esperanto* aperis averaĝe en la mezo de la koncerna monato kaj estis sendita al 4890 pagintaj ricevantoj (4933 en 1998). El la 11 numeroj, 7 ricevis koloran kovrilon kaj unu aldonajn 4 paĝojn. *Kontakto* estis redaktata, presata kaj ekspedata el Bulgario al 1559 kotizintoj (1998: 1723).

La Librotena Fakoj havis preman jar-komencon, pro transiro al eŭro. La ĝisistemo de UEA estis vigle uzata. El la 34 060 librotenaj operacioj, 18 636 okazis en la UEA-kontoj de membroj kaj E-organizaĵoj.



25-jara epoko fermiĝis en Germanio: ges-roj Elisabeth kaj Richard Hirsch transdonis la taskojn de resp. ĉefdelegito kaj peranto al pli juna zorganto, d-ro Wolfgang Schwanzer.

Tra la jaro pliampleksiĝis kaj pliaktualiĝis la TTT-ejo de UEA (www.uea.org), dank' al la helpo de eksteroficejaj vo-



KONGRESO

Multnombro en metropolo

Estrarano: Lipari

Kun 2712 aliĝintoj el 66 landoj, la 84-a Universala Kongreso de E-o (Berlino, 31 jul.-7 aŭg.) apartenis al la pli grandnombro ĉeestataj UK-oj, kutimaj en Eŭropo.

La kompleksan organizon laboron respondecas surŝultrigis tre kompetenta LKK, kiun estris la sindona Ina Tautorat kaj, en la preparaj jaroj, Bengt-Arne Wickström. La kongresejo bone servis al la specifaj celoj de E-mond-kongreso, kaj plendoj ĉefe koncernis la grandan distancon al iuj el la tranoktejoj, neeviteblan en tiel vasta metropolo.

Malofte kongresa temo tiel harmoniis kun la tutmondaj pensofluo kiel en 1999: "Tutmondiĝo — ŝancoj por paco?". Sub la reĝisorado de Vilmos Benczik, pluraj prelegoj traktis facetojn surprize diversajn de la temo, kaj la revuo *Esperanto* donis poste spacon al kelkaj ĉi-priaj kontribuoj.

En la kultura programo multis koncertoj ankaŭ dum la tago; la vesperajn teatraĵojn povis spekti nur parto de la kongresanaro pro teknikaj problemoj.

Junulara programo okazis ĉe la amas-

loĝejo kaj eĉ plurloke en la urbo, kiel koncerto de Persone en la kafejo Flöz.

36 infanoj el 14 landoj aliĝis al la Internacia Infana Kongreseto en Potsdam, la unua IIK post la fino de 16-jara zorga flegado fare de Kristoforo Fettes. En 1999 la ĉef-prizorgantino estis Sabine Trenner, kiu sin dediĉis al ĝi entuziasme; en Berlino la Estraro nomumis Stefan MacGill nova komisiito pri IIK. En la kongresejo funkciis ankaŭ vartejo zorge de la gepatroj mem.

Apartan ŝaton esprimis kongresanoj al la loĝiga servo, kiu sukcesis eĉ lastminute proponi tranoktejon laŭ ĉies monujo.

Konklude: kongreso malfacila kaj laciga por la organiza teamo, sed ŝajne kontentiga por la multnombra partoprenantaro. ♦



FINANCO

Ekvilibro post longa marŝo

Estrarano: Corsetti

lontuloj. La Libroservo havis ege sukcesan jaron, enspezinte € 143 498 (135 430 en 1998) kun neta gajno de € 45 811 (47 871). Du kvinonoj el la vendoj okazis dum la Berlina UK, kiu tiel superis la ciferojn de ĉiuj antaŭaj kongresoj. Entute la Libroservo vendis 18 482 ekzemplerojn de 2057 titoloj (escepte de diversajoj).

La Eldona Fakoj surmerkatis multajn novaĵojn: *Kio ni estas kaj kion ni celas* (studkajero pri la Praga Manifesto), *Lingva arto* (festlibro omaĝe al W. Auld kaj M. Boulton), *Hejma vortaro*, *Kulturo kaj sano* (Unesko-eldonaĵo), *Poraktiva lingvopolitiko* (aktoj de la lingvopolitika seminario en la Praga UK), *Lito apud la fenestro* (rakontoj k.a. de B. Salt), *Paĉjo, kio estas rasismo?* (T. Ben Jelloun), prelegaro de IKU en la Berlina UK kaj reeldono de *Esperantaj sinonimoj* (J. Ojalo).

En la serio "Diskutkajeroj" aperis *Spirito de Esperanto kaj la samideanaj malamikaĵoj* (I. Bociort) kaj *Zamenhof, hodiaŭ* (A. Chiti-Batelli), kaj en la Esperanta serio de "Esperanto-dokumentoj" *Ĉiuj kune* (aktoj de la Strategia Forumo en Montpeliero). ♦

En 1999 la spezokonto de UEA fariĝis ekvilibra, unuafoje de post 1982. Tiel atingis sian celon la strebado, komencita post 1991, en kiu jaro la spezokonto registris je 88 008 gld. (€ 39 900) pli da elspezoj ol enspezoj. Por ke sinsekvaj grandaj defecitoj ne forkonsumu la kapitalon, oni serioze konsideris malgrandigi la oficistaron kaj redukti servojn. Anstataŭ agi tiel draste, la tiama Komitato prave trovis pli prudenta laŭgrade malgrandigi la defeciton per pli kost-efika mastrumado de elspezoj kaj kreskigo de enspezoj.

En 1991 la negativa saldo estis 26% de la Ĝenerala Kapitalo (340 345 gld. = € 154 440). En 1999 ĝi estis praktike nula (€ 133,96), dum la Ĝenerala Kapitalo atingis € 401 060, parte pro kurzkresko de valorpapiroj sed ĉefe dank' al multaj donacoj kaj heredaĵoj. Malgraŭ malpli alta rentonivelo, la kreskinta kapitalo liveris en 1999 al la spezokonto € 47 430 da rento, t.e. € 14 350 pli ol buĝetite.

En la sama tempo la Kapitalo Dumvivaj Membroj kreskis de 421 842 gld. (€ 191 420) al € 644 159. El ĝi oni pagas al la spezokonto la servojn al la dumvivaj kaj honoraj membroj kaj honoraj patronoj. Por kreskigi la kapitalon, oni longe tenis la kompencon malalta, nur po 50% de la MA-kotizo por ĉiu unuopulo. En 1997 kaj 1998 la kompenso povis kreski al 70% kaj en 1999 jam al 90%, kio sumiĝis je € 40 869, t.e. € 8877 pli ol buĝetite.

Ĝenerale la buĝeto por 1999 realiĝis kun nekutima precizeco. Apud la kresko de rentoenspezoj kaj DM-kompenso menciindaj diferencoj estis nur ĉe salajrokostoj, je € 8466 pli altaj pro la dungo de plia oficisto, kaj ĉe la kotizoj (aliaj ol DM) kaj abonoj, pri kiuj la buĝeto estis je € 9252 tro optimisma. Kvankam la perdo ĉe ordinaraj kotizoj ne kontuzis la spezokonton ankoraŭ pasintjare, dank' al la pli granda DM-kompenso, la problemoj de falanta membronombro postulas urĝan atenton. ♦



KAMPANJO 2000

Ambicia novaĵo apud tradicioj

Estrarano: Corsetti

Esence la tuta agado de UEA ligiĝis al Kampanjo 2000, tiel ke tiu ĉi raporto samtempe estas raporto pri ĝi. Tri eroj tamen estu elstarigitaj ĉi-ĉapitre.

La Nitobe-simpozio survojaj iĝi tradicio: kadre de la Berlina UK ĝi okazis la duan fojon. En la 2-taga programo, kunordigita de Hans Erasmus, prelegis sep lingvistoj kaj lingvopolitikistoj pri la temo "Tutmondiĝo kaj lingva diverseco". En la pli



ol 100-kapa publiko estis pluraj lingvistoj, kiuj ekster la simpozio konatiĝis ankaŭ pli vaste kun la fenomeno UK

kaj ligis kontaktojn kun esperantologoj-interlingvistoj kaj ordinaraj kongresanoj.

Same por la dua fojo okazis en Berlino la Strategia Forumo de la E-Komunumo. Por ŝpari tempon la ĉeestantaj asocioj ne plu povis prezenti sin (krom per disdono de materialoj) sed estis petitaj fokusiĝi al ko-

munaj aferoj de la E-komunumo aŭ ties parto. Post enkondukaj vortoj tamen regis tiom vigla diskuto ke ĝi devis esti ĉesigita pro tempomanko. Estis decidite ke ankaŭ la trian Forumon kunvoku UEA, sed nepre kun pli da tempo por libera diskuto.

Komplete novspeca estas la projekto Indiĝenaj Dialogoj, gvidata de Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge el Narwal-Instituto, Nederlando (dec., p. 205-206). UEA aŭspicias la projekton, kiu celas krei komputilan informreton per-Esperantan inter indiĝenaj organizaĵoj tra la mondo. En 1999 okazis jam du kursoj kun trideko da partoprenantoj, kiuj lernis E-on kaj la uzon de Interreto. ♦



LANDA KAJ REGIONA AGADO

Reta diskuto, pacifika debuto

Estraranoj: Corsetti, Huĝimoto (ekde la Berlina UK); Gbeglo (Afriko)

La rilatado inter UEA kaj la Landaj Asocioj multe plivigliĝis. Reta diskut-listo por funkciuloj de Landaj Asocioj komencis kontentige funkcii. Restas ankoraŭ multo por fari, ĉefe pri landoj kiuj ne povas rilati rete, kaj multo farendas por ke la Landaj Asocioj de UEA pli intime kunlaboru kun tiuj de TEJO kaj ILEI. Ankaŭ la land-interna kunlaboro trans etnaj limoj povus plurloke multe pliboniĝi.

Afriko

Klopodoj por starigo de Afrika Oficejo pluiris kaj ricevis fincan helpon de Institucio Hodler kaj Subvencio Cigno. Spertiĝo-cele pri administrado, la togolandano Raoul Hounnake laboris ses monatojn en la CO, por poste helpi el Togolando en la gvidado de la Afrika agado. Ekfunkciis la Afrika Komisiono, kaj ekis klopodoj por efektiviĝi la agadplanon "Prioritato Afriko".

Kadre de la sepa nacia E-kongreso de Togolando decembre (feb. '00, p. 28)

okazis interkonsiliĝo, kiun, krom togolandanoj, partoprenis aktivuloj el Benino, Ebura Bordo, Ganao kaj Niĝerio. Traktiĝis precipe gvidado kaj strukturo de landaj asocioj, instruado kaj ekzamenado.

Ondo da Vero (OVO), aperanta trimestre en Togolando, rolas kiel tutafrika informilo kaj diskutejo. Jarfine ekfunkciis afrika TTT-ejo (www.perso.wanadoo.fr/eric.coffinet/Afrika_Agado.html), dank' al la laboro de d-ro Eric Coffinet (Francio). Krome, en oktobro la estrarano pri afrika agado ricevis propran retadreson, kio plu efikigis la kontaktadon.

Malgraŭ progresoj, ne mankis problemoj. En kelkaj landoj estis, kaj plu restas, internaj konfliktoj. Granda problemo estas la nepagipoveco de afrikanoj. La agado estas financata de Fondaĵo Afriko, kies rimedoj fontas el donacoj kaj restas lastatempe sur la nivelo de 40 000 gld. Pri tiu granda kontribuo Afriko kore dankas la donacantojn. Tamen, ĉar la movado kreskas

en multaj landoj, necesas pli da subvencio, des pli ke pro aliaj bezonoj kaj sia daŭra defecito la Fondaĵo devis en 1999 redukti la nombron de kolektivaj abonoj de *Kontakto* al 123 (en 1998: 230). Por glate disvolvi la agadon, necesus ke Fondaĵo Afriko sukcesu kreskigi la donacojn ĉiujare per 25%.

Al afrikanoj — ĉirkaŭataj de problemoj de evoluanteco — gravas ne nur lingvolernado, sed ankaŭ ke ĝi estu ligita al io kio iel kontribuos al la solvado de iliaj problemoj: per realigo de etaj projektoj (la klubo de Lund en Svedio jam rilatas kun tanzanianoj pri fabrikado de sunkuiriloj), per malfermo de lernejoj ktp.

Ameriko

Komence de la jaro okazis en Bogoto Kvara Tut-Amerika Kongreso de E-o (marto, p. 43), organizita de Kolombio E-Ligo, kiu inspiris la e-istojn en Kolombio al plia viglo. Novaj retaj diskutlistoj en Argentino, Brazilo, Ĉilio, Kolombio, Meksiko, Peruo kaj Venezuelo ebligis viglan diskutadon pri movadaj temoj kaj la lingvo mem. La informilo *AktivAmeriko* aperis du fojojn. La redaktoro,



INFORMADO

Pli kaj pli komunikade

Estrarano: Kniivilä

Dum la Universala Kongreso en Berlino kunsidis komitata laborgrupo pri informado. La laborgrupo proponis ke UEA ellaboru strategiajn gvidliniojn por la informada laboro kaj difinu ĝiajn ĉefajn celojn. Diskuto pri tiaj strategiaj gvidlinioj estis komencita en nova retpoŝta listo de UEA, kiun partoprenas landaj aktivuloj pri informado. La laborgrupo ankaŭ sugestis ke UEA preparu praktikan konsilaron pri informado, sed la ellaborado de tia konsilaro devas atendi ian provizoran konkludon de la strategia diskuto.

La Eldona Fakto de UEA produktis la tre utilan studkajeron *Kio ni estas*

kaj kion ni celas. La artikolaro pli funde prilumas la tezojn de la Praga Manifesto, kaj ĝi sendube utilos en la precizigo de la informa strategio de UEA.

Multa energio estis dediĉita al la evoluigo de nia informa laboro en Interreto, kvankam multaj el la rezultoj iĝis videblaj al la ĝenerala publiko nur en la nuna jaro. Jarfine estis entreprenita kompleta tralaboro de la oficiala paĝaro de UEA, nun videbla ĉe <http://www.uea.org>. Tra la retpaĝoj kaj en *Esperanto* estis ankaŭ lanĉita kolektado de subskriboj por Manifesto 2000 de Unesko, kampanjo kiun intensigas broŝuro dissendita komence de la nuna jaro.

La retpoŝtaj Gazetaraj Komunikoj de UEA, kiuj en la jaro 1998 ekaperis en Esperanto, estis dissenditaj 40-foje kun 61 diversaj eroj. La komunikoj estas ekde 1999 regule tradukataj kaj dissendataj ankaŭ en la angla kaj franca lingvoj, kaj ekde la nuna jaro aldone en la hispana. Tamen ili ankoraŭ atingas nur tre malgrandan parton de la potenciala publiko, kaj necesas pli vaste diskonigi ilian ekziston. La nacilingvaj versioj de la Gazetaraj Komunikoj antaŭ ĉio povas utili al Landaj Asocioj, kiuj povas libere uzi la materialojn en sia informado, kombinante ilin kun lokaj aktualajoj.

La informa laboro dum la Universala Kongreso en Berlino estis bone organizita kaj generis respektindan eĥon en la germanaj amaskomunikiloj. Lige kun



EDUKADO

Interkulture

Estrarano: Chrdle

Ĉi tiun laborkampon plu prizorgis ILEI, laŭ interkonsento el 1990.

En 1999 klaran profilon akiris la projekto Interkulturo, al kiu ĝis la jarfino aliĝis ĉ. 90 lerneaj klasoj el ĉiuj kontinentoj. ILEI kunordigis la instruadon en tiuj klasoj per cirkuleroj kaj TTT-

Ekiris la preparoj por la unua seminario de arabaj esperantistoj en Amano, realiĝonta en 2000.

Okazis prelegoj en Aleksandrio pri E-o.

Azio

La movado restas forta en la tradiciaj landoj — Japanio, Ĉinio, Koreio, Vjetnamio, Irano — kaj fortiĝas en kelkaj aliaj: Barato, Nepalo, Pakistano.

Kelkloke, kiel en Indonezio aŭ Tajlando, la movado apenaŭ sukcesas ekmarŝi, malgraŭ kelkaj gratulindaj iniciatoj, ekz. la prelegoj de Kep Enderby en Tajlando, organizitaj de lokaj eŭropdevenaj e-istoj. En Centra Azio la manko de kontaktoj kun la tutmonda esperantistaro kaj la malfacila ekonomia situacio bremsas la evoluon.

La Komisiono por Azia E-Movado (KAEM) jene resumas sian laboron:

1. En aŭgusto okazis en Hanojo ĉiufanke sukcesa Dua Azia Kongreso (nov., p. 182-183).

2. Progresis diversaj KAEM-projektoj, i.a. membrigi aktivajn aziajn e-istojn en UEA.

3. KAEM daŭre eldonas sian organon *Esperanto en Azio*, kiu interligas aziajn esperantistojn.

Oceanio

Jarfine ekfunkciis UEA-komisiono por ĉi tiu mondparto sub kunordigo de Brian Fox el Nov-Zelando. La landaj asocioj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando tre pozitive reagis al ĝia peto pri konkreta helpo.

Estis sisteme kolektataj ĉiuj adresoj de e-istoj kaj "duonesperantistoj" loĝantaj en insuloj de Pacifiko. Konkretaj instruprojektoj estis lanĉotaj en 2000.

paĝaro. Krome ĝi eldonis la amuzan lern-helpilon *Okulo* de Stefan MacGill, por la plej junaj lernantoj de bazlernejo.

Komenciĝis diskuto pri reviziado kaj aktualigo de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, kies sesioj okazis laŭkutime dum la jaro. Ĉe landaj ekzamenaj instancoj videblis tendenco proksimiĝi al iu internacie akceptota normo rilate la postulojn al la ekzamenatoj.

ILEI aranĝis sian konferencon en Karlovy Vary (okt., p. 165). ♦

Eŭropo

En la UK elektiĝis nova estraro de Eŭropa Esperanto-Unio, kun Umberto Broccatelli, Hans ten Hagen kaj Katinjo Fetes-Tosegi. Ekaperadis *Eŭropa Bulteno*, senpage dissendata per la reto. Informado al eŭropaj kaj naciaj parlamentanoj estis tre aktiva precipe en Francio.

Malgraŭ kelkaj kritikoj al la koncerna parto de la pasintjara raporto, ne eblas ne reemfazi: estas tempo ke EEU iĝu vera supera organo de la landaj asocioj en la teritorio de Eŭropa Unio, eventuale kun propra oficejo en Bruselo. Ĝi ankaŭ starigu al si la ĝeneralan celon disvastigi E-on en tiu regiono kaj ne nur rilati pinto-nivele kun eŭropaj parlamentanoj.

Ĉiel, gravas klopodoj refortigi la agadon por Esperanto en Okcidenta Eŭropo, kie la movado riskas maljuniĝi.

En eks-socialismaj landoj — post jaroj da duboj pri la valoro de organizita movado kaj post perdo de la antaŭa ŝtata apogo — la situacio diverslande komencas reveni al normalo. Restas tamen ĉie malfacila ekonomia situacio kaj granda kultur-imperiisma premo, kiu, ĉefe por la junaj generacioj, aspektigas Esperanton senutila flankokupo.

Aliflanke en kelkaj landoj, ekz. Ĉeĥio, ĉiam konserviĝis unuecaj movadaj strukturoj; kelkaj aliaj, kiel Bulgario, komencas kompreni la gravecon de reveno al kunlabore organizita agado.

Salutindaj estas la klopodoj en Ruslando redoni forton al la landa asocio, same kiel la daŭre stabila situacio en la Baltaj landoj. ♦

James Piton, per konstanta serĉado de infomoj kaj diversaj alvokoj sukcesis krei atentokaptan informilon. La UEA-Komisiono por Ameriko helpe de Fondaĵo Ameriko ebligis ke Rubén Diaconu el Argentino dum du monatoj volontulis ĉe UEA kaj ĉeestis gravajn somerajn E-eventojn. La Fondaĵo subtenis la sendadon de lernomaterialo al Argentino, Ĉilio, Dominika Resp. kaj Kolombio. Ankaŭ Hispana E-Federacio subtenis la dissendadon de lernomaterialo al la hispanlingvaj landoj. La vizito de pluraj alikontinentaj e-istoj al diversaj regionoj de Ameriko estis aparta helpo. Ilia ĉeesto, eĉ en malgrandaj E-klubo, sentigis al la lokanoj ke la lingvo vere uzeblas en kontinento tiom vasta.

Araba mondo

Ekfunkciinta Komisiono pri Arabaj Landoj daŭrigis la laboron kontaktadi ĉiujn e-istojn en arabaj landoj kaj serĉadi novajn lernantojn. Ĝi jam havas rilatojn kun preskaŭ ĉiuj arabaj landoj. Al nova reta diskutejo por arabaj e-istoj aliĝis ankaŭ surprize multaj nearabaj e-istoj scipovantaj la araban kaj kun rilatoj en tiuj landoj.

aktuala kverelo pri la stato de la germana lingvo en Eŭropa Unio, Germana E-Asocio kaj E-Asocio de Finnlando altiris iom da atento per pledo por lingva egaleco en la funkciado de Eŭropa Unio. Tuj post la UK la tutmonde spektebla brita televidkanalo BBC World dissendis dekminutan intervjuon kun la prezidanto de UEA.

Grandan aktivecon de la loka movado instigis la Dua Azia Kongreso en Vjetnamio, kaj dum la kongreso la televido dissendis novaĵojn pri ĝi ĉiuvespere. Reprezentantoj de UEA sukcese informis pri Esperanto ankaŭ en la enorma konferenco de la Haga Alvoko por Paco.

La rubriko "Influe" pri informado okfojojn aperis en la revuo *Esperanto* dum la pasinta jaro. ♦

EKSTERAJ RILATOJ

Partnerece kun Unesko

Estrarano: Enderby

La kontribuo de UEA al la agado de Unesko daŭris vigla. En marto prezidanto Enderby en la Pariza Unesko-sidejo havis utilajn renkontiĝojn kun pluraj funkciuloj. Li precipe diskutis pri la manieroj partopreni en la agado por homaj rajtoj kaj pri la ligo de la projekto Interkulturo (vidu "Edukado") al la Unesko-projekto Linguapax.

Rezulte de lia vizito, UEA iĝis membro en la Komisiono de NRO-j pri Homaj Rajtoj kaj Toleremo kaj poste observanto ĉe la Konsulta Komitato por Lingva Plureco kaj Multlingva Edukado.

UEA subskribis kontrakton kun Unesko pri Partnereco por la Kulturo de Paco. UEA i.a. devontigis sin diskonigi Manifeston 2000 kaj kolekti subskribojn por ĝi. Ĝia E-traduko estis disvastigata rete kaj aperis en *Esperanto* (nov., p.185).

La plej granda ĉi-kampa atingo de 1999 estis akcepto de la rezolucio "Lingvo kaj

homaj rajtoj" en la Internacia Konferenco de NRO-j kun Oficialaj Rilatoj kun UN, oktobre en Seulo, kie UEA estis reprezentata de prezidanto Enderby kaj prezidinto Lee (nov., p.185). Ĝia ĉefa ero estas rekomendo al la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN surtagordigi la temon de lingvo kaj homaj rajtoj.

Plu aktivis la Laborgrupo pri la Lingvo-problemo en EU, kies strategio estas ne trudi E-on kiel solvon de la lingvo-problemo de EU sed konsciigi pri la ekzisto de tiu problemo kaj klopodi akceptigi eksperimentojn ĉe kiuj E-rolus en la realigo de iuj celoj de EU. Konkretaj proponataj projektoj estas NEIGHBOUR (pri la propedeŭtika valoro de Esperanto) kaj RELAIS (pri ĝia uzo kiel pontolingvo interpreta). La projekto-priskriboj estis tradukitaj al preskaŭ ĉiuj EU-lingvoj, por transdono al la eŭroparlamentanoj en feb. 2000. ♦

KULTURO

Jaro de jubileoj

Estrarano: Lipari; ekde la Berlina UK: Huĝimoto

Kun abunda muzika kaj teatra programo ankaŭ en 1999 la UK estis la plej elstara kultura evento Esperanta. Ankaŭ en la traktado de la kongresa temo, "Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?", kulturaj aspektoj ricevis multan atenton.

La Belartaj Konkursoj (BK) de UEA jubileis: ili okazis jam por la 50-a fojo. En la sep branĉoj partoprenis 102 konkursaĵoj. La altan kvaliton montris i.a. la aljuĝo de unua premio en ĉiu branĉo. Plej multaj el la premiitaj verkoj aperis, kiel tradicie, en la beletra revuo *Fonto*.

Lige kun la anonco de la BK-rezultoj estis lanĉita la festlibro *Lingva arto* (red. V. Benczik), kiun UEA eldonis omaĝe al la 75-jariĝo de siaj honoraj membroj

William Auld kaj Marjorie Boulton.

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorssen ricevis 14 subvencipetojn, el kiuj 9 akceptitaj dividis la sumon de 1825 €. Premio Onisaburo Deguĉi (2000 €) iris al Heinz Schindler pro lia multjara solidara helpo al e-istoj en malriĉaj landoj.

OSIEK donis sian 10-an premion al la E-eldono de la ĉina klasika romano *La ruĝdoma sonĝo*. Per la dua asigno de la titolo "E-isto de la Jaro" la ĵurio de la revuo *La Ondo de Esperanto* distingis la aktivecon de la prezidanto de UEA, Kep Enderby. Fondumo Zamenhof, en kiu membras ankaŭ UEA kaj TEJO, aljuĝis sian unuan Medalon de Toleremo al papo Johano Paŭlo la 2-a. ♦

JUNULARO

Pozitiva jaro, s

Se priskribi la jaron 1999 por TEJO en unu vorto, plej trafa estus "pozitiva". Plej videbla tio estis en la 55-a IJK, kie ne nur suneklipso estis grava evento. Pli ol 500 partoprenis la junularan kongreson en Veszprém (Hungario), kie i.a. koncertis la fama bando Amplifiki.

Dum la jaro, TEJO organizis du seminariojn subvenciatajn de Eŭropa Junulara Fondaĵo, unu en Torino ("Lokaj kulturoj en tutgloba mondo"), kaj alian en la Eŭropa Junulara Centro de Strasburgo ("Internaciismo kaj naciismo — ĉu konfliktaj au kompletigaj ideoj?"). Ambaŭ ludis gravan rolon en la trovado kaj trejnado de novaj aktivuloj. Plia seminario, planita por la jarfino, estis ŝovita al printempo 2000, kadre de IJF en Italio.

FAKA AGADO, SCIENCO

Teksi retojn pe

En 1999 konsiderinde kreskis la atento al la ebloj de novaj komunikiloj, precipe Interreto. Jarkomence ĉiuj rete atingeblaj fakaj asocioj estis invitataj partopreni malgrandan enketon, i.a. pri pliboniĝo de la kunlaboro kun UEA. (Tio ne signifas ke UEA volus flankenigi asociojn sen reta alireblo.) Respondis ĉirkaŭ duono de la asocioj, favorante — krom unu escepto — plioftigon de rilatoj kun UEA.

Grandan atenton oni dediĉis denove al terminologio. Terminologia kunveno dum la Berlina UK renkontis



LINGVO, ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Ponto fortigita

Estrarano: Corsetti

stabiligo

Estrarano: Lipari

En la IJK elektiĝis nova estraro. Sperta kaj sindediĉa teamo tuj eklaboris kaj alportis novan viglecon. Sepa estrarano, Vladka Chvátalová, estis alelektota en printempo 2000, sed efektive eklaboris jam en oktobro 1999.

Grava parto de la laboro de la nova estraro rilatis al stabiligo de TEJO. La agado estis fokusita je trovado kaj trejnado de novaj aktivuloj, valorigado de ekzistantaj laborfortoj kaj respekto por la ideoj kaj agado de ĉiuj. Pliaj kunlaborantoj estas daŭre serĉataj, speciale por la kampo de eksteraj rilatoj.

En la CO dum plejparto de la jaro laboris volontulo de TEJO, Aleksander Blinov, kiu poste eniris la estraron. En la IJK kaj ekde septembro en la CO

Sub nova redaktoro, prof. Marc van Oostendorp, pluaperis la revuo *Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado (LPLP)* de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo (CED). Same regule aperis la jarkvarona bulteno *Informilo por Interlingvistoj*, redaktata de Detlev Blanke.

La Esperantologia Konferenco, kaj ligita seminario pri "Lingvoj en Interreto", vekis grandan intereson.

En junio, dudeko da fakuloj traktis la temon "Lingvoj en la 21-a jarcento" en konferenco organizita de CED ĉe Universitato Yale, kun ĉi ties financa subteno kaj sub egido de ĝia Centro pri Humanistiko. Temis pri daŭrigo de similtema CED-konferenco en 1998.

Nelaste pro tiuj konferencoj kaj similaj aranĝoj, notinde oftigas pozitivaj kaj konstruaj aludoj al kaj artikoloj pri Esperanto en la faka literaturo, same kiel tiutemaj kontribuoj en lingvistikaj konferencoj (ekz. en la Hungaria Konferenco pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko; vidu jul.-aŭg. '99, p. 137).

Neformala lingvopolitika kolokvo novembro en Roterdamo (jan. '00, p. 6) entreprenis repensi la tutan agadon de UEA, CED k.a. instancoj sur la intelekta-lingvista-interlingvista kampo.

Ŝajnas neprokrasteble ke CED funkcii kiel vera esplorcentro kaj kunordiganto de la laboro de individuoj aŭ organizitaj grupetoj da esperantistoj-lingvistoj, kiuj daŭre pontas al sialandaj neesperantistaj medioj. ♦

er la reto

Estrarano: Chrdle

tre pozitivan eĥon kaj la deziron ke ĝi iĝu regula kongresero. La diskuto pri TEC montris ke, laŭ ĉiuj ĉeestantaj terminologoj, ĝi estas bezonata kaj utila por senĥaosa evoluigo de la faka terminologio, sed ke ĝiaj strukturo kaj labormaniero devas ŝanĝiĝi kongrue kun la ebloj de novaj teknologioj. Por plua diskuto estis lanĉita la diskutlisto "terminologio-I", al kiu rajtas aliĝi ĉiuj ajn interesato.

El diversaj instigoj de UEA al fakaj organizaĵoj menciindas traktado kun la aliĝinta asocio Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

pri la demando ĉu ĝi povus esti malfermita por transport-fakuloj ne-fervojistaj, kiuj ĝis nun ne havas sian fakan organizon.

La kongresa kaj kleriga entrepreno KAVA-PECH lanĉis novan eldonserion "Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", malfermitan ankaŭ por aliaj eldonejoj. Kiel la unua volumo aperis *Modernaj rimedoj de komunikado*, aktoj de kolokvo el 1998 (vidu apr. '00, p. 75), kaj planatas eldono de min. unu verko ĉiujare.

En la Berlina UK, AIS jam la kvinan fojon riĉigis la programon de la Internacia Kongresa Universitato per la studsesiario AIS-IKU: prof. Hans Eichhorn kaj d-ro Reinhard Fössmeier donis ok-lecionajn kursojn pri psikiatrio resp. komputila sekureco, en plenegaj salonoj. La Premion Pirlot de AIS gajnis Wim De Smet, pro sia verkaro pri Nova Biologia Nomenklaturato. ♦

laboris Sandra Schweder. Tio tre forte kontribuis al la bonfarto de la eksteraj rilatoj kaj TEJO-seminarioj. Konstateblas tamen ke estas pli da laboro ol povas fari unusola volontulo — plia laborforto estas bezonata.

Al TEJO aliĝis nova landa sekcio, Honkonga Junulara E-Asocio, kiu kunlabore kun la ĉina landa sekcio ekorganizas la 56-an IJK. Per tiu kongreso TEJO deziras kontribui al la azia movado kaj plifortigi la rilatojn kun la aziaj landaj sekcioj kaj membroj.

Pretigante al la "jaro de lingvoj" (2001), TEJO i.a. ekpreparis seminarion "lingva ĉielarko". Ĝi estas sekvo kaj paŝo en la agado pri lingvofestivaloj. En septembro en la CO pri tio laboris volontule Ekaterina Jevlampieva.

Fine de 1999 aperis nova eldono de Pasporta Servo, unuan fojon kun pli ol 1000 gastigantoj. Kvar fojojn aperis *TEJO-tutmonde*, kaj ses fojojn la revuo *Kontakto*.

Pliaj detaloj troveblas en la jarraporto de TEJO, aperonta en la somera numero de *TEJO-tutmonde*. ♦



FINANCAJ ALDONAĴOJ

Spezokonto

Ĉiuj sumoj estas en eŭroj.

		Kostoj					
Rezultoj		Buĝeto	Rezultoj				
1998		1999	1999				
228797	Salajroj	240049	246699	7783	Preskostoj Jarlibro	7941	7615
44577	Socia asekuro	45832	46634	8828	Dissendo/kovertoj	8848	8025
5929	Suplementoj	5990	6315	2196	Grafiko	2269	2214
732	Kafo, teo, lakto	862	646	-6681	Anoncoj	-7260	-6814
0	Malsankompenso	0	0	12126	Jarlibro, nete	11798	11040
3176	Pensiarango	2269	3176	2628	Preskostoj Kontakto	4538	3534
283211	Salajroj ktp, nete	295002	303470	6776	Dissendo/kovertoj	3834	5472
8625	Afranko, nete	6353	8361	2065	Grafiko	4084	2449
2432	Telekomunikiloj	3403	2606	2900	Redakto	2723	2723
1674	Presajoj	2723	2153	-29	Anoncoj	-136	-47
3813	Materialoj	2950	4143	14340	Kontakto, nete	15043	14131
2968	Maŝinoj, riparo/prizorgo	3040	3105	6100	Estraro (vojaĝado)	5899	8351
681	Revizoro	681	681	2471	Estraro (korespondado)	908	1488
137	Administraj kostoj	363	278	1183	Oficistoj (vojaĝado)	2269	1522
2402	Kopiado	2949	2589	569	Vojaĝado (UK)	1815	1016
-1818	Kopiado (vendoj)	-1815	-2331	10323	Vojaĝoj/korespondado	10891	12377
20914	Centra Oficejo, nete	20647	21585	1361	Edukado	1361	1361
4966	Gaso, elektro	5218	5490	500	Informado	1588	1415
309	Akvo	318	239	750	Eksteraj rilatoj	1135	1459
745	Riparo de la Domo	726	120	725	Komisiitoj, vojaĝoj	454	435
3541	Purigado	3721	3545	91	Komisiitoj, korespondado	227	64
2787	Asekuro	2904	2686	3427	Movada evoluigo	4765	4734
1409	Impostoj je la Domo	1543	1437	1340	Bankokostoj	1361	1662
-1107	Luo ricevita	-726	-1058	-661	Kurzdiferencoj	0	-1846
12650	Oficeja Domo, nete	13704	12459	868	Reprezentado	2723	2379
16722	Preskostoj Esperanto	18151	19553	3391	Antaŭaj jaroj	0	1352
11084	Grafiko	10891	11102	112	Diversaj kostoj	227	121
21944	Dissendo/kovertoj	24050	21749	5050	Ĝeneralaj kostoj	4311	3668
-2124	Anoncoj	-4084	-2789	2939	Amortizo, domo	2882	2880
47626	Esperanto, nete	49008	49615	1280	Amortizo, aparatoj/mebloj	1157	1179
				269	Amortizo, telefonsistemo	204	202
				3881	Amortizo, komputiloj	3086	2987
				2015	Amortizo, programaro	1883	1511
				10384	Amortizo entute	9212	8759
				420051	Sumo de la kostoj	434381	441838

Bilanco


Ĉiuj sumoj estas en eŭroj. Por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1998.

		Aktivoj					
		1998	1999				
Domo, Roterdamo	144007	141127		Stokoj libroservaj	102972	113604	
Tereno Aspremont	1	1		Stokoj, Eldona Fako	175499	137059	
Nemoveblaĵoj	144008	141128		Stokrezervo	-39707	-3967	
Ekipaĵoj & mebloj	7786	6963		Presajoj, materialoj k.s.	6801	5003	
Komputilaj aparatoj	9062	6975		Provizoj entute	245565	251699	
Programaro	6045	4534		Ricevotaj rimedoj	42895	63743	
en Novjorko	1	1		Antaŭpagitaj kostoj	10063	761	
Maŝinaro ktp	22894	18473		Debitoroj	149415	50621	
Blokigitaj monrimedoj	1696	1723		Debitoroj ktp entute	202373	115125	
Akcioj	238080	337056		Ŝparkontoj kaj deponoj	1027891	869012	
Obligacioj	496322855795			Kurantaj bankokontoj	158537	144900	
Miksaj	535420	732457		Kasoj diversaj	3591	1996	
Valorpaperoj entute	1269822	1925308		Kasoj/bankokontoj entute	1190019	1015908	
				Sumo de la aktivoj	3076377	3469364	

ESTRARA RAPORTO 1999

Rimedoĵ

Rezulto 1998		Buĝeto 1999	Rezulto 1999				
2723	Membroj Gvidlibro	2791	2975	15923	Vendoj de Eldona Fako	17697	18464
27392	Membroj Jarlibro	21101	23136	-10840	Aldonoj (novaj libroj)	-4538	-12216
119869	Membroj-Abonantoj	126151	121458	705	Ŝanĝo stokvalora	-5740	-1017
31082	Dumvivaj Membroj	31991	40870	-1755	al stokrezervo	-1770	-1371
6049	Membroj Jarlibro (junaj)	8077	6026	-596	Tantiemoj	-907	-669
7499	Membroj-Abonantoj (junaj)	8123	6193	3437	Eldona Fako, nete	4742	3191
194614	Kotizoj de individuaj membroj	198234	200658	21454	Grafikaj servoj CO	21691	19027
8643	Aligitaj membroj	8849	8490	3670	Aliaj servoj CO	3267	4009
1348	Aligitaj membroj junaj	1747	1220	0	Programado	907	0
4112	Abonoj <i>Esperanto</i>	4424	3986	681	Institucio Hodler	681	681
1080	Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	476	1005	13840	Kompenso Propaganda Konto	13840	7500
6426	Abonoj <i>Kontakto</i>	7238	6539	14361	20%a ĝustigo: laŭ kalkulo	0	14953
2700	Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	2723	2137	-14361	20%a ĝustigo: al rezervo	0	-6000
19801	Societo Zamenhof	21328	19698	39645	Servoj kaj Kompensoj	40386	40170
2898	Fakaj Organizoj	2949	2906	85693	Kotizoprocentaĵo UK	75781	88809
-2936	pago al TEJO	-3698	-2736	-20193	Rezervo	-4537	-15000
238686	Kotizoj	244270	243903	0	Turismo	5445	0
135430	Vendoj de la Libroservo	122521	143499	12419	Rento, nete	14612	28836
-87559	Kosto de varoj venditaj	-79956	-98168	4265	Donacoj al la Ĝenerala Kaso	4084	5825
47871	Libroservo, malnete	42565	45331	878	Aliaj enspezoj	771	1140
-1815	Katalogokostoj	-1815	-1815	83062	Diversaj enspezoj entute	96156	109610
-1030	al stokrezervo	-1089	-1136	412300	Sumo de la rimedoĵ	427574	441704
2444	Abonfako	2359	2450	7751	Saldo	6807	134
47470	Libroservo, nete	42020	44830	420051	Sumo de la kostoj	434381	441838



Pasivoj

Kapitalo	360477	401060	Fondaĵo Canuto	3714	4174
Saldo de spezokonto	-7751	-134	Fondaĵo Grabowski	29767	36238
Kapitalo Azio	324063	392452	Fondaĵo Junularo	9783	15209
Kapitalo, Ĝenerala kaj Azio	676789	793378	Fondaĵo Saliko	26888	27931
Kapitalo Dumvivaj Membroj	520874	644159	Fondaĵo Wüster	1551	1901
Rezervo, debitoraro	10860	9195	Konto Espero	6507	12235
Kongresa Rezervo	59166	58535	Propaganda Konto	28048	10795
Rezervo IJK	5042	5358	Triamonda Kongresa Fondaĵo	30841	30092
Rezervo, emeritaj oficistoj	8555	46505	Volontula Fondaĵo	32483	38845
Aliaj sumoj rezervitaj	143710	111286	Fondaĵoj entute	283811	304660
Rezervoj entute	227333	230879	Antaŭricevitaj rimedoĵ	127496	128150
Apogo Thorsen	13415	12040	Pagotaj kostoj	30471	34913
Belarta Fondaĵo	69312	79762	Pendantaj spezoj	4744	7259
Fondaĵo Afriko	1870	3032	Kreditoroj	657305	771466
Fondaĵo Ameriko	19830	20602	Deponoj de membroj	547554	554500
Fondaĵo Azio	850	883	Kreditoroj k.s. entute	1367570	1496288
Fondaĵo Biblioteko	8952	10921	Sumo de la pasivoj	3076377	3469364

FINO DE LA ESTRARA RAPORTO 1999



BELETRO: Mao-simpozio

La verkaro de la 37-jara ĉina poeto MAO Zifu, laŭreato de Belartaj Konkursoj, estos studata en simpozio en lia loĝloko Changde, prov. Hunan (14-16 aŭg.), organizite de pluraj asocioj, inkl. Ĉinan E-Ligon. Informas ZHANG Shaoji; ☎+86/20/83-69-71-94; ✉sauxkio@hotmail.com, <http://www.agadu.163.net/>.

INSTRUADO: La pola per E-o

Ĉu troviĝos 8 homoj por lerni la polan lingvon per E-o julie aŭ aŭguste, ĉe renoma universitato Krakova? Instruos Maria Majerczak, diplomita instrui la polan kiel fremdan lingvon. Informiĝu germane, angle aŭ pole ĉe Uniw. Jagiellonski, Szkoła Letnia Kultury i Języka Polskiego, ul. Garbarska 7a, 31-131 Kraków; ☎+48/12/421-36-92; ☎422-77-01; ✉plschool@jetta.if.uj.edu.pl; <http://www.if.uj.edu.pl/UJ/SL/>.

KONGRESOJ: UEA ĉe ideoborso

La Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Nikola Rašić, trovis multajn utilajn kontaktojn por eblaj estontaj UK-oj inter la 2500 ekspoziciantoj de la tutmonde plej granda foiro de la kongresa industrio, Eŭropa Ideoborso de Turismo kaj Renkontiĝoj (Ĝenevo, 23-24 majo). Kiel membro de Klientara Konsilio de Internacia Konferenca kaj Kongresa Asocio (ICCA), fondita laŭ iniciato de UEA (vidu nov. '99, p. 201), Rašić ĉeestis ankaŭ ties Ĝenevan kunsidon.

Kadre de la Ideoborso okazis la 4-a Forumo de Junaj Profesuloj, kun 30 partoprenantoj el 15 landoj, al kiu ICCA invitis Clay Magalhães, asistanton de la Kongresa Fakto de UEA. La forumo donis trejnadon pri efikaj planado kaj realigo de kongres-organizado. La gekolegoj de Magalhães trovis tre impresaj liajn informojn pri la UK-oj, kiujn, malgraŭ ilia multnombro, organizas ĉefe volontuloj kun nur unu plentempa oficisto, kun aliĝotizoj tre malaltaj kompare kun aliaj kongresoj.

Clay Magalhães



UEA / F. L. Veithy

INTERRETO: E@I

Kun subteno de la TTT-firmao Razorfish kaj de sveda ŝtata organizo prijunulara, 21 gejunuloj el Danio, Litovio, Norvegio, Pollando, Rusio kaj Svedio seminariis pri "E@I", t.e. "Esperanto ĉe Inter-

reto", apud Stokholmo (17-21 apr.). Prelegis spertuloj kiel



ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTOJ: FLOSE SUR RUĜA MARO



Komplezo de Raymond Lecat

En Egiptio, esperantisto Raymond Lecat (ano de la UEA-Komisiono pri Arabaj Landoj) kaj aliaj konstruigis ŝipon kun la nomo "Esperanto". Ĝi ĉefe estos uzata por turistoj ĉe la Ruĝa Maro, en Sharm El Sheikh. Ĉe enŝipiĝo la pasaĝeroj ricevos plurlingvan flugfolion pri la motivo de la nomo "Esperanto". (R. Corsetti)



AVIADO: Gaŭla rezisto

"Keskidi-flugoj" moknomas usonaj pilotoj flugojn al Francio, pro "Qu'est-ce qu'il dit?" ("Kion li diras?"), frazo ofte subaŭdebla radie ĉe francaj flugkontrolistoj.

En aviado nun la tutmonde uzata lingvo estas la angla, sed ne ĉiam kaj ĉie: ekz. inter la Pariza flughaveno Roissy kaj la francaj pilotoj de Air France oni uzas la francan — aŭ uzis, ĝis decido de tiu kompanio impusis transiron al la angla. La rezisto estas tamen sufiĉe vigla, kion artikolisto de *International Herald Tribune* (24 majo) ŝajnas primoki: "la flugkompanio... subtaksis kaj la malfacilojn de tia transiro kaj la obsti-

nan gaŭlan fieron (tiele!) de francaj pilotoj kaj flugkontrolistoj."

Ni baldaŭ aperigos artikolon pri lingvouzo kaj avia sekureco.

LINGVAJ RAJTOJ: Genocido?

"Lingva genocido en eduko, aŭ tutmonda diverseco kaj homaj



Tove Skutnabb-Kangas

rajtoj?": jen multdira titolo de 818-paĝa anglalingva verkego de lingvistino Tove Skutnabb-Kangas (<http://babel.ruc.dk/~tovesku/>), baldaŭ ĉe la Libroservo de UEA.



NOV-ZELANDO: Ese-konkurso

Meze de 1999, Nov-Zelanda E-Asocio tutlande informis lernejojn, bibliotekojn kaj universitatojn pri sia esea konkurso, kun monpremioj por verkintoj pri "Kial E-o estos la internacia lingvo en la nova jarmilo". Alvenis 7 eseoj: 4 ricevis premiojn, kaj al ĉiuj verkintoj NZEA donacis unujaran membrecon. Pri la konkurso informis lokaj gazetoj, kaj la NZEA-hejmapaĝo ricevis centojn da vizitoj tiuperiode. (Esperanto sub la Suda Kruco, D. Ryan)

Kvindek jarojn post la fondiĝo de la Kastelo ni apelacias por subteno al la **JUBILEA LIBRO DE GRÉSILLON** aperonta en la jaro 2002.

Malfermiĝis fonduso ĉe UEA "jugr-g" por akcepti viajn kontribuojn, sendeblajn ankaŭ al la speciala poŝteka-konto de la kompilanto: «Mme LLOANCY Marie-Thérèse — Memolibro» 5 908 07 A Bordeaux. Kiu donacos minimume €50 ricevos senpagan ekzempleron de la bonkvalita, plurloke kolore ilustrita libro.

erreto

Bertilo Wennergren (HTML kaj la tekstredaktilo U n i R e d), Franko Luin (spertoj kun www.esperanto.net),

se kaj www.esperanto.net),

Henning von Rosen (rilato inter lingvoj homaj kaj komputilaj). Ralf Fröhlich diskutigis pri strategioj por Interreto, kaj Fredrik Marcus (Razorfish) montris eblan estontecon de Interreto. Sveda televido favore raportis pri la seminario. Vidu <http://www.esperanto.net/echei/>. (H. Lundberg)

JUNULARO: IJK-novajoj

Pro pli favoraj kondiĉoj, la 56-a IJK okazos en pitoreska vilaĝo, Sai Kung. La moderna junulara kongresejo najbaras al montaro, lago kaj plaĝo. Ĝis 1 junio aliĝis 144 homoj el 26 landoj. Pliaj informoj: <http://www.esperanto.org/ijk2000/>. (B. Mak, Ret-Info)

SVEDIO: Presprete elrete

Sveda E-Federacio publikigis sian informmaterialon, plejparte svedlingvan, Interrete en prespreta formo. Broŝuroj, flugfolioj, la Manifesto de Prago svede ktp. preneblas PDF-formate por loka aŭ individua uzo el la svedlingva paĝo <http://www.esperanto.se/html/trycksaker.html>. (NUN)

USONO: Lingua... kia?

En la maja-junia n-ro de la Novjorka *Lingua Franca* (<http://www.linguafranca.com>), legata pleje de universitatoj, aperis longa, objektiva, informplena esplorartikolo de Hal Cohen pri E-o, kun tamen ambiguaj konkludoj, kion kvazaŭ simbolas ke, post la kovrita anonco "Esperanto: lingvo de amo", la artikolo tamen titoliĝas "Ĉu adiaŭ al Esperanto?". Antipode, la taggazeto *The Australian* transprenis la artikolon (17 majo), kaj tie sekvis pluraj leteroj laŭdaj, i.a. de Ralph Harry. Ĉu sekvas represoj aliloke? (M. Fettes, H. Tonkin, K. Enderby)



HISPANIO: Neamase, sed malferme

La 59-a Hispana E-Kongreso (29 apr.-1 majo, San Sebastián de los Reyes apud Madrido) altiris, malgraŭ neamasa partopreno, neatenditan atenton de amasinformiloj: i.a. favore artikolis la gravaj taggazetoj *El Mundo* kaj *Diario 16*, kaj kun simpatio raportis la tutlanda televido Tele 5 (tri minutojn en la dimanĉa novaĵelsendo je 20:30). Helpis ke la proporcio de gejunuloj estis nekutime granda, dank' al paralela kongreseto por ili.

FRANCIO: Greziljono loĝebla

Kiel sciате (vidu jan. '99, p. 7), la Esperanta kulturdomo Kastelo Grésillon devis plibonigi siajn sekur-instalaĵojn por la rajto plu funkcii ne nur kiel kursejo, sed ankaŭ kiel restadejo. Kontrolinte la plibonigojn (savelirejojn ktp), la komisiono pri sekureco nun permesis la uzadon de la unua etaĝo. Eblos do ne nur kursaj, sed ankaŭ gastaj en la kastelo dum la someraj aranĝoj, de 15 julio ĝis 19 aŭgusto. (J. Rapley)

• Sendu gratulon al urbestro Jean Carrère (M. le Maire, FR-66700 Argelès-sur-Mer, Francio), pro la inaŭgurota strato Zamenhof en lia urbo. (Okazas)



La urbestro parolis belege pri kaj en Esperanto kaj entuziasme ĉeestis enkondukan E-kurson. Temis pri kongreso intence tre malferma al ekstera publiko, kiu venis multnombro kaj scivoleme svarmis antaŭ la libroservo kaj en la salonoj. "Eksterulinoj" Amelia Fernández kaj Eva Suá-

rez-Llanos parolis pri siaj fakoj, lingvistiko resp. Amnestio Internacia; Jorge Camacho samtempe interpretis iliajn prelegojn en Esperanto, kaj tradukis E-lingvaj prelegojn hispanen. (M. Pancorbo, D. Rodríguez en NUN)

UK Ĝis la 1-a de junio al la Tel-Aviva UK (25 jul.-1 aŭg. 2000) aliĝis 1124 personoj el 54 landoj.



FETTES: Nun doktoro

Mark Fettes (38-jara) iĝis doktoro ĉe Universitato de Toronto. Lia tezo pri la lingva ekologio de edukado "esploras la implicojn de lingva diverseco por la organizado de lerneja edukado".

FJODOROV: E-prezidento

Ni jam raportis (feb. '98, p. 38) ke Nikolaj Fjodorov (41-jara), prezidento de la Ĉuvaŝa Respubliko kadre de Rusia Federacio kaj pli frue rusia justicministro, nomis sin esperantisto. Fakte, li estis lerninta la lingvon en ko-

responda kurso de Daniel Kolker (65-jara) kaj aliĝis al Esperanto-tendaro apud Moskvo. Kolker komentas ke li tiam grandskale "E-instruis koresponde, tra la tuta tiama Sovetunio, dum preskaŭ 20 jaroj, do ne mirindas ke [iuj] lernintoj faris bonegan karieron en sia profesio". (D. Kolker)

SILFER: Ĉe sveno de sloveno

Subitan svenon spertis Milan Kučan (59-jara), prezidento de Slovenio, dum regalo honore al la verkistoj de PEN-Klubo Internacia, en sia rezidenco apud Bled. La ek-svenon rimarkis la delegito de Esperanta PEN-Centro, Giorgio Silfer (50-jara), kiu alkuris ĝustatempe por kapti la prezidenton antaŭ falo surdorsen.

En konferenco de PEN Internacia (Bled, 3-7 majo) Silfer i.a.

ERNST 90-jara
S-ino Elfriede Ernst, unu el la plej grandanimaj mecenatoj de UEA, festos sian 90-an naskiĝtagon la 19-an de aŭgusto.



deklamis en la poezia vespero versojn el *La infana raso* de Auld, kun posta traduko al la franca kaj angla. (*Heroldo Komunikas*)

SUJET: Plumo gajnas vojaĝon


Al konkurso de Radio Ĉina Internacia pri "Ĉinio tra miaj okuloj" alvenis pli ol 3000 leteroj. Ses verkintoj, skribintaj en la angla, araba, ĉeĥa, ĉina, taja resp. E-o,

estis invitataj al senpaga Pekina vojaĝo (7-14 majo). Unu el ili estis la franca e-isto Maurice Suet (80-jara), al kiu "la malfacila lingva komunikado inter la premiitoj donis okazon montri la bonan komunikadon kun [la] ĉina e-ista interpretistino". Suet emfazis la saman punkton en kvar intervjuoj dissenditaj en E-o, la franca kaj la angla. (M. Suet, NUN)



Katbulteno en nova felo

"Revuo, kiu miaŭas en E-o", la jartriona *Folioj de Kat-Amikaro* promociiĝis inter la profesiece redaktatajn E-revuojn: de 2000, CO-oficisto Franĉjo Veuthey dediĉas kelkajn libertempajn ho-



rojn al ĝia teksta kaj grafika redaktado. Provezkzempleru haveblas de la redakcio (Nieuwe Binnenweg 70-I-R, NL-3015 BC Rotterdam, Nederlando; □folioj@hotmail.com) kontraŭ 2 internaciaj respondkuponoj.

Eŭska bovino en Esperanto

Romano de la plej konata eŭska verkisto nuntempa, Bernardo Atxaga, ĵus aperis en Esperanto. *Memoraĵoj de eŭska bovino* estis lanĉita de la aŭtoro kaj de la tradukinto



Aitor Arana, mem konata verkisto en la eŭska, per gazetara konferenco trilingva (Esperanta, eŭska, hispana) la 31-an de marto en Vitoria/Gasteiz. Atxaga rimarkigis ke ĉi tiu dek-unua traduko de *Memoraĵoj* estas unu el la malmultaj tradukoj faritaj rekte el la eŭska. Li parolis pri "eksterordinara evento pro la universaleco de Esperanto". La lanĉo ricevis eĥon en amas-informiloj eŭsklingvaj kaj hispanlingvaj, ekz. en la televidoj ETB kaj Canal Gasteiz, en la ĵurnalo *Gara* kaj la vaste legata taggazeto *El Correo*. (X. Rico Iturriotz)

EPĈ 50-JARA

Okulfrapaj verdaj steloj kaj aro da malnovaj numeroj ornamas la kovrilon de la 500-a numero de *El Popola Ĉinio*, unu el la plej belaj kaj plej legataj revuoj de Esperantujo, kiu ĵus 50-jariĝis. Gratulmesaĝoj, rememoraĵ artikoloj kaj intervjuoj kunmetiĝas al bunte riĉa, historie kalejdoskopa numero.



→ En la aprila numero de la plurlingve aperanta *Kuriero* de Unesko (vidu p. 102-103) Atxaga intervjuo rakontas kial kaj kiel li verkas en la eŭska.

Tena: Radio-dramo

Tena, Hejmo en Mezeŭropo, romano de Spomenka Ŝtimec (Vieno: Pro Esperanto, 1996) ricevis radio-adapton en la japana. Trovinte ĝin en traduko de MORI Singo (vidu majo '99, p. 96) en Tokia librovendejo, Hoŝihisa Hosina, direktoro en la Drama Fakto de la radio NHK, proponis *Tena* por dramigo kaj elsendo en 2001. La 22-an de majo Hosina vizitis la aŭtorinon en Kroatio

por kolekti pliajn sonmaterialojn mezeŭropajn. Ŝtimec surbendigis Esperantlingvan mesaĝon por la japanaj aŭskultontoj. (S. Ŝtimec)

Rerigardo: La plej malnova

Membroj de la E-grupo de Nürnberg (la plej malnova en la mondo) kaj e-istoj el la najbaraj Erlangen kaj Forchheim raportas en la interesa broŝuro *Rerigardo 99* pri grupaj aktivadoj pasint-jaraj, parte germane sed ĉefe en Esperanto. Havebla kontraŭ 2 internaciaj respondkuponoj ĉe Anny Hartwig, Pirkheimerstr. 11, DE-90408 Nürnberg, Germanio; □ea1448@fen.baynet.de.

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Apartaj mondoj: verboj kaj participoj. Geraldo Mattos (1931). Chapecó: Fonto, 1999 (2-a eld.). 88p. 21cm. Nia akademiestro prilumas la demandon "ata/-ita". € 6,00.

Ĉaso je rememoroj. Kazimjeŝ Ŝĉurek (1925-2000). Beauville: Laŭtel, 2000. 67p. 21cm. Rememoroj el riĉa esperantista vivo. € 4,80.

Ĉu ŝi mortu tra-fike?

Priseksa kaj prikrima fantazi (1982). Johán Balano (ps. Claude Piron, 1931). Viena: Internacia E-Muzeo, 2000 (2-a eld.). 74p. ISBN 3 901752 18 8. 23cm. "Kvazaŭ giganta ŝerco, en kiu sekso ludas gravan rolon". € 9,90.

Edziĝo. *Epoko: Kajero 143(2).* Ichok Lejbuŝ Perec (1852-1915). El la jida trad. T. Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1993. 27p. 28cm. Novelo de unu el la tri fondo-patroj de la juda literaturo, moderna romantikisto. € 4,20.

En la poŝtoveturilo (1891). *La Epoko: Kajero 143(1).* Ichok Lejbuŝ Perec. El la jida trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1993. 21p. 28cm. Novelo. € 3,90.

Epoko, La. Kajero 17: Ash, Krall. *Germana unuigo.* Timothy Garton Ash (1955), Hanna Krall k.a. Svidniko: Libro-Mondo. 78p. 28cm. Trad. Tomasz Chmielik. Tri eseoj kaj diversaj historiaj dokumentoj. € 8,40.

Epoko, La. Kajero 18-1: Grass, Ciemiński. *Grass - Vivo kaj verko.* Günter Grass (1927), Ryszard Ciemiński. Svidniko: Libro-Mondo. 56p. 28cm. El la germana kaj pola trad. Tomasz Chmielik kaj Gerd Bussing. Prezento de germana Nobel-premiito per diversgenraj tekstoj liaj kaj pri li. € 6,90.

Epoko, La. Kajero 18-2: Grass, Nawarecki, Graczyk. *Pri "La lada tambureto".* Aleksander Nawarecki, Ewa Graczyk. El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo. 28p. 28cm. Du eseoj pri majstro-verko aperonta en Esperanto. € 3,90.

Epoko, La. Kajero 18-3: Grass. *El "La lada tambureto".* Günter Grass (1927). El la germana trad. T. Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo. 64p. 28cm. Specimenaj ĉapitroj. € 6,90.

Epoko, La. Kajero 21: Octavio Paz, Nobel-premio pri literaturo 1990. El la hispana trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo. 73p. 28cm. Ĉerpaĵoj el la vivoverko, kun biografia skizeto. € 8,40.

Vieno tradicie patronas originalan beletron. Roterdamo klerigas pri demokratio. Tuluzo kruste grincas.



Esperanto-English / English-Esperanto Dictionary & Phrasebook. Joseph F. Conroy (1946). New York: Hippocrene Books, 1999. 223p. ISBN 0 7818 0736 0. 19cm. Vortareto kaj frazaro por anglalingvanoj. € 16,50.

Esperantski mozaik. Davor Klobučar (1961). Osijek: Liberiga Stelo, 2000. 114p. ISBN 953 98081 0 3. 21cm. Kroatlingva. Informlibro pri E-o kun skiza gramatiko. € 6,00.

Fermita urbo, La. Sciencfikcia romano. István Nemere (1944). Viena: Internacia E-Muzeo, 2000 (2-a eld.). 158p. ISBN 3 901752 19 6. 23cm. Kial miloj da homoj vivas en subtera, mezepokeca kolonio? € 10,80.

Ili kaptis Elzan! Johán Valano (ps. Claude Piron, 1931). Chapecó: Fonto, 2000 (3-a eld.). 85p. 21cm. Humura romano en facila lingvaĵo. € 9,30.

Interlinguistik und Lexikographie. Beiträge der 8. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, Berlin 1998. Red. Ulrich Becker. Berlin: GIL, 1999. 91+33p. 30cm. Germanlingva. Prelegoj pri vortaristaj kaj tradukistaj problemoj. € 17,40.

Interpopola konduto (1935). *Iam kompletigota verkaro de E. Privat; Volumo 11.*

Edmond Privat (1889-1962). Red. Tomasz Chmielik, Claude Gacond. Svidniko: Libro-Mondo, 1993 (2-a eld.). 108p. 28cm. Pri interŝtataj problemoj kaj la malfacila vojo al paco. € 12,90.

Kio estas demokratio? *80 demandoj kaj respondoj* (1995). David Beetham, Kevin Boyle. Kun desegnaĵoj de Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000. 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Facile komprenebla manlibro pri la esenco, celoj kaj praktika funkciado de demokratio, verkita laŭ komisiono de Unesko. € 9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kisa malsano, La (1991). *Tiaj ni estas, Volumo 2: Noveloj* (1965). Claude Piron (1931) resp. Sándor J. Bako (1915-90). Viena: Internacia E-Muzeo, 2000. 119p. ISBN 3 901752 17 X. 23cm. Dua eldono de facilstila romaneto Pirona, plus 9 noveloj de hungara verkisto. € 10,50.

Neniu ajn papilio. *Romano.* Trevor Steele (1940). Viena: IEM, 2000. 337p. ISBN 3 901752 21 8. 23cm. Spertoj de juna anglo en Germanio de la 60-aj jaroj. Funda reverko de *Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen*. € 15,00.

Összefoglaló eszperantó nyelvtan. László Szilvási (1957). Budapest: Lingvo-Studio, 1999. 170p. 21cm. Hungarlingva. Lernilo kaj informlibro, preparanta al mezgrada ŝtata lingvoekzameno. € 10,80.

Sava la saventino. Gerard Cool (1921). Pazarĝik: Belloprint, 2000. 20+228p. 20cm. "Sava kaj la fondo de la tutmonda movado de verdaj paculoj. Ĉu per ĝi ŝi sukcesos savi la mondon komence de la tria jarmilo? Esotera scienc-fikcio". € 12,00.

Surkliifa. *Romano.* Serĝo Elgo (ps. Georges Lagrange, 1928). Viena: Internacia E-Muzeo, 2000. 214p. ISBN 3 901752 16 1. 23cm. Pri misteraj okazaĵoj en surmonta vilao. € 13,50.

Tempo de mesio, La. *La Epoko: Kajero 143(8).* Ichok Lejbuŝ Perec. Vidu ĉe "Edziĝo". 13p. 28cm. € 3,90.

KOMPAKTA DISKO

Esperanto subgrunde. Donnevill: Vinilkosmo, 2000. 67 min. Kompilaĵo. Ludas 15 bandoj "anarkipunkaj, hardkoraj, grincaj, krustaj, surfgaraĝaj kaj traŝaj". € 15,00.

Märtha ANDRÉASSON (1927-2000), delegito en Hising Kärra (Svedio), mortis la 8-an de majo. Plurajn jardekojn ŝi prezidis la E-klubon de Kungälv; ekde 1961 ŝi estis estrarano kaj de 1978 prezidanto de la regiona organizaĵo E-Alianco de Gotenburgo. Ŝi servis kiel estrarano de Sveda E-Federacio kaj Sveda E-Instituto, aktivis pri Unesko-agado kiel konsilantarano de la asocio Monda Kunagado kaj funkciis kiel UEA-komitatano (1981-92). En la lastaj jaroj precipe ŝi motoris la strebon de Gotenburgaj esperantistoj inviti UK-on al sia urbo.

Adrianus N. BUS (1913-2000), 45 jarojn delegito en Bussum (Nederlando), forpasis la 15-an de aprilo.

Roberto CASTELLÓ (1914-1998) forpasis la 26-an de aŭgusto 1998 an Andoro, kie li estis delegito. Li donacis sian imponan bibliotekon pri internaciaj lingvoj al la E-Muzeo en Sant Pau d'Ordal.

Hendrik DE ROOVER, e-isto de 1958, forpasis en Antverpeno komence de marto. Iama delegito pri instruado kaj naturismo, li servis kiel ĝenerala sekretario de Belga E-Federacio (1965-67) kaj longdaŭra es-

Josip VELEBIT (1911-2000), poeto kaj tradukisto, mortis la 21-an de aprilo en Vrbovec (Kroatio). E-isto de 1930, li kunlaboris en la revuoj *Literatura Mondo*, *La Suda Stelo*, *Monda Kulturo*, *Voĉo*, *Fonto* k.a. Libroforme li eldonis i.a. la tradukojn *Kanto al mia koro* de D. Tadijanović (1936), *Fabeloj* de F. Škrlić (1962), la eposon *La morto de Smail-agao Ĉengić* (1972), *Girlando da sonetoj* de F. Prešeren (1973), la romanon *Ventoj* de B. Ivanov (1976) kaj *Tri noveloj* de S. Krčmar (1980). Liaj propraj poemoj aperis en *Reeĥoj* (1961), *Esperanta antologio* (1984) kaj la vivresuma volumo *Kanto de telegrafistoj* (1996). Velebit estis konata ankaŭ kiel kroatlingva verkisto kaj tradukisto el deko da lingvoj, ekz. de Rilke.



Arĥivo de UEA

trarano de la urba klubo Verda Stelo. Li gvidis kursojn, en 1965-66 kolektis 1700 subskribojn por la peticio al UN kaj estis malavara donacanto al Flandra Esperanto-Ligo. Li aŭtoris romaneton por geknaboj, *La aventuroj de ŝpar- kaj alia porketoj* (1982) kaj rakontaron, *La ruĝa hirundo* (1995).

Raymond DOURY (1912-2000), iama delegito pri mondcivitanismo, mortis la 4-an de marto en Combejean (Francio). Ĝis la mezo de la 80-aj jaroj li aktivis en la Pariza regiono, i.a. kiel delegito por Parizo, gvidanto de konversaciaj rondoj kaj redaktoro de la gazeto *Paris-Esperanto*.

László DUBRAVSZKY, verkinto de *Sugestoj por kompletigo de la juraldiplomatia terminaro* (1984), forpasis 94-jara, la 30-an de oktobro 1999, en Budapeŝto.

Pranas GAVĖNAS (1918-2000), sacerdoto, multe verkinta litove kaj portugale (en Esperanto: *Sankta Kazimiro*, 1995), forpasis la 7-an de februaro en Alytus (Litovio). Estas lia merito la starigo de impona Zamenhof-monumento en Veisiejai (vidu sep. '98, p. 163).

Jiří KAREN (1920-2000; propranome Ladislav Podmele), ĉeĥa kaj Esperantlingva verkisto, honora membro de Ĉeĥa E-Asocio, forpasis la 30-an de aprilo.

Karen eldonis 17 ĉeĥlingvajn poemarojn, el kiuj *Flugilhava ŝtono* kaj *Antaŭ la naŭa ondo* aperis en E-traduko de Jiří Kořínek resp. Rikardo Ŝulco. Li mem esperantigis la romanon *La plej eminenta inter Pierotoj* de F. Kožík (kun J. Vondroušek), eldonis la broŝureton *Poeto ne mortas* (fragmentoj el verkoj de Kožík), kontribuis per tradukoj el la ĉeĥa literaturo al la gazeto *Paco* kaj en ĉeĥaj periodaĵoj propagandis Esperanton. Liaj originale verkitaĵoj poemoj aperis dise tra Esperantujo.



Francja Esperantisto

Jeannine VINCENT (1922-2000), dumviva membro, e-isto de 1947, forpasis la 22-an de aprilo en Baugé (Francio), la vilaĝo kie ŝi loĝis de sia emeritiĝo en 1977, dediĉante sin al la apuda Kastelo Grésillon. Akirinte kiel la unua virino la Diplomon pri Altaj E-Studoj de Franca E-Instituto, ŝi iĝis ties kasisto kaj rolis dum trideko da jaroj kiel ĝia vera gvidanto. Ŝi servis ankaŭ kiel ĝenerala sekretario, poste vicprezidanto de la landa E-asocio UFE. Ŝi gvidis multajn kursojn, ĉefe al infanoj. Delegito kaj pedagogia fakdelegito dudekon da jaroj, ŝi regule membris en Societo Zamenhof kaj partoprenis en UK, ĉiam kantante en ties Internacia Ĥoro. Ŝi tradukis novelojn de Villiers de l'Isle-Adam (*Franca E-isto*, 1991) kaj la romanon *La verda radio* de J. Verne (1995).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependeryb@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina,

Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Hugi-moto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyôto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Knivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.

KLASIKAJŬOJ

je bagatela prezo!



VIKTIMOJ
Julio Baghy
€12,25 €9,00

PILGRIMO
Julio Baghy
€10,20 €6,00

La Libroservo de UEA transprenis la tutan stokon de la eldonaĵoj de Fenikso kaj draste malaltigis iliajn prezojn:




SUR SANGA TERO
Julio Baghy
€13,60 €9,00

PRETER LA VIVO
Julio Baghy
€10,20 €6,00



LA VIVO KAJ MORTO DE VLADIMIR VARANKIN
(1902-1938)
Nikolao Stepanov
€4,60 €2,40

PIGRE PASAS LA NOKTO
István Nemere
€13,60 €9,90



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ €0,80 (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.



Tibor Sekelj
Kumeŭaŭa

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.), 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. €6,60. Triona rabato ekde 3 ekz.

WINNIE-LA-PU

...en Esperanto!



Traduko de Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin kun enkonduko kaj vortolisto por anglalingvanoj. Ilustraĵoj de Ernest H. Shepard.

Eldonis UEA: 1992. Tole bindita kun kromkovrilo. Prezo: €12,30. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

La baza gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo:

metodiko de la esperanto-instruado

de Rudolf Rakuŝa
(1893-1970)

Temas pri 3-a eldono de la verko unue aperinta en 1957 kaj kompletigita en 1970.

189p. 20cm. ISBN 92 9017 045 X. Prezo: €6,90.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Unika Kursaro Serĉas Instruistojn

La monde konata Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (<http://esperanto.org/nask/>) pasintjare festis sian 30-an jaron ĉe Sanfranciska Ŝtata Universitato.

Ĉiujare, dum tri semajnoj en junio-julio, la Kursaron partoprenas studentoj el tuta Nord-Ameriko kaj aliaj landoj tra la mondo, en kvar niveloj ekde komencanta ĝis spertula. Tri instruistoj dividas la instrulaboron kaj interkonsentas pri metodologio, kursmaterialoj k.s. La salajro estas proksimume \$3500 depende de kvalifikoj.

La gvid-komitato pri la kursaro invitas sinproponojn de spertaj instruistoj por instrui en iu venonta jaro. Ĉiujare la komitato komunikas siajn rekomendojn al la universitato, kiu respondecas pri la fina decido. Kandidatoj devas kapabli instrui kompetente je ĉiuj kvar niveloj.

Scio de la angla lingvo ne necesas, sed regado de pluraj lingvoj estas bonvena. Sendu leteron pri via instru-biografio kaj antaŭvidata kontribuo al la kursaro, resumon de viaj edukaj, profesiaj kaj movadaj spertoj, kaj du aŭ tri rekomendleterojn al:

Ellen M. Eddy, Administranto, Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, 11736 Scott Creek Drive, Olympia WA 98512, Usono; ☎ (360) 786-9175, ✉ eddyellen@aol.com.

TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO.

Heidi Suonuuti. El la angla trad.

Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke.

Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3.

21 cm. Prezo: €5,40.

Triona rabato ekde 3 ekz.



Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.

La aŭtorino estas multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj funkciulo de ISO, Internacia Organizaĵo por Normigado. La originalo estis verkita laŭ komisió de Nordterm, asocio de terminologiaj societoj en Nordio.


NOVAĴOJ

de la eldona fakto
de UEA

ENKONDUKO AL DEMOKRATIO

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj.
David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la
angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000.
143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: EUR 9,90.

Du elstaraj britaj fakuloj klarigas en ĉi tiu gvidilo de Unesko okdek el la plej premaj demandoj pri la esenco, celoj kaj funkciado de demokratio. La demandoj estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj kaj ilia defendado; demokratia socio; la estonteco de demokratio. Bonega kaj klara enkonduko en la plej gravan politikan koncepton, uzebla kiel lernolibro aŭ baza konsultlibro. Bela grafika vesto kun spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉefdesegnisto de la franca ĵurnalo *Le Monde*.



RESPONDOJ PRI RASISMO



PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO?
Tahar Ben Jelloun (1944). El la
franca trad. Armela LeQuint kaj
Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA,
1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8.
19cm. Prezo: € 6,50.

"Bela libreto pri komplika temo. Dekjarulo povas kompreni la enhavon kaj plenkreskulo legas ĝin kun intereso. La originalo de la maroka Goncourt-laŭreato fariĝis furoraĵo en Francio. Aĉetu kaj legu ĝin. Diskutu ĝin en via Esperanto-klubo, kun viaj infanoj kaj kun viaj amikoj." (Leif Nordenstorm)

POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ.
Jaan Ojalo (1914). Rotterdam:
UEA, 1999 (3-a, korektita eld.).
96p. ISBN 92 9017 067 0.
19cm. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur Plena Ilustrita Vortaro, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĉigi sian vortostokon.



KAJ PLIE...

LA LABORO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR PLI PACA MONDO. Ulrich Lins. 12p. Prezo: € 2,10.

THE WORK OF THE UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION FOR A MORE PEACEFUL WORLD. U. Lins. 12p. Prezo: € 2,10.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>